

Ora Ĵurnalo

Numero 31, Aŭgusto 2020



Christinæ kyrka / Tyska kyrkan (la germana preĝejo en Gotenburgo)

Al la tuta mondo:

Bonvenon al la **verda Gotenburgo!**

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Enhavo	2	Vojaĝo per biciklo tra 16 landoj en Eŭropo kaj Nordafriko.....	25
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Esperanto-Stacidomo – de Ralf Fröhlich, Germanio	27
Espeporko meditas.....	3	Memoro pri vizito al GDR	28
Gunnel Nilsson de Älvsbyn forpasis.....	4	Esperantogruppens resa till Elsass.....	32
La vorto "lotta" tradukita en kelkajn lingvojn.....	5	Eŭroskola en Esperanto	34
Sprida Esperanto – viktigt och nödvändigt! ...	8	W. H. Trompeter, germana pionira esperantisto	36
La Vojo de L.L. Zamenhof.....	9	El la biblioteko: Heinrich Heine: Elektitaj poemoj	38
Pri lingvoj parolataj en Finnlando	10	Das Glas Blas Sing Quintett.....	39
Dufoje oni donis atenton al Jarl Hammarberg ĉi-somere.....	11	La Virinan tagon oni celebru ne nur la 8an de marto!	39
Esperantistoj kaj la kronviruso	12	Poemo okaze de la internacia tago la 8an de marto 2020 en Goma urbo.....	40
Tenu distancon! Håll avstånd!.....	12	Intervjuo fare de Augustin kun Jacqueline ..	40
Jen kanto pri la pandemio en la jida.....	13	Familjeliv i en annan del av världen!	42
Legendo pri la ŝlosiloj de la ĉielo.....	14	Carl-Olof Selenius: pri mia traduko de "La knabo kiu vivis kun strutoj"	44
Jan Hellström raportas pri "montegoj" en Vättlefjäll.....	14	Nova romano de Julian Modest	45
Den 2/5 fick vi ett ovanligt besök i Hökälla..	16	Turka Stelo	46
Feria rememoro el Germanio.....	17	Kat-rakonto el Turka Stelo	46
Tante Maria	17	Pri cifereco.....	47
Du kantistoj, kiujn ŝatis Tante Maria	20		
Germanaj proverboj.....	21		
Willy Burgemeister, fervora esperantisto kun civitaneco en kvin landoj	22		

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com
kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@telia.com. Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.





Espeporko meditas



☆ Aŭgusto – la lasta somermonato – **daŭre havas la kronviruson kiel temon.** Interese estas iniciato de TEJO: – intervjuo kun junuloj en pluraj landoj. Mi ŝatas aŭskulti ilian klaran fluan Esperanton kiam ili rakontas pri siaj spertoj de la pandemio kaj ĝia influo sur la ĉiutaga vivo.

☆ **UEA konstatas ke la membroj de Esperantujo en Svedio malkreskas.** Kiel plibonigi la situacio? En protokolo de 1964 montriĝas, ke jam tiam estis problemo pri la malkreskanta esperantomovado. Kiel solvi la problemon? SEJU proponis dungon de sindiko (ombudsman), kiu rondvojaĝu en la tuta lando kreante kaj organizante novajn klubojn. Mi dubas ĉu tio estus la solvo de nia tempo. Pli bone uzu interreton iel. Sed kiel???

☆ Pri la diversaj **lingvoj parolataj en Finnlando** raportas Raita Pyhälä.

☆ **Germanio nun estas en fokuso:**

Legu pri **Tante Maria**, kiu influis la infanecon de Ingegerd! Legu pri **Willy Burgemeister**, kiu bicikle trapasis 16 landojn, vizitante esperantistojn. Legu pri la **vojaĝo al Strasburgo** (en la sveda) fare de Folke Wedlin kun siaj tiamaj lernantoj kaj ankaŭ pri la **”Eŭroskola tago”** (en Esperanto)! **La iama DDR** estas sur fotoj faritaj post la falo de la muro. Eĉ se ne multo restas el la muro, oni povas vidi stratŝtonojn, kiuj markas kie ĝi estis.

Aŭskultu la germanan grupon **”Das Glas Blas Sing Quintett”** – amuza sperto kaj legu pri **Feria remoro el Germanio kun pluvego** de Monica.

☆ Pri la **virina tago** celebrata en Kongo rakontas Augustin Kakozwa. Okazis ja la 8an de marto, sed kial oni ne povu festeni virinojn la tutan jaron?

☆ Pri **vivo en Pakistano** kune kun du infanoj, kiam la edzo estis for en UN-komisioj, rakontas Agneta Bürgemeister. Pri vivo en la **Okcidenta Saharo** ja temas **”La knabo kiu vivis kun struoj”** kiun ni en antaŭa numero de Ora Ĵurnalo prezentis. Nun la tradukisto, Carl-Olof Selenius, skribas pri la traduklaboro.

☆ En numero 30 Ralf Jalming rakontis pri sia **unua vojaĝo al Moskvo**. Valentin Melnikov, la viro, kiu faris la foton de Ralf, Svetlana kaj Victor sur la Ruĝa Placo, skribis el Moskvo al Ora Ĵurnalo, petante la e-poŝt-adreson de Ralf. Ili antaŭ multaj jaroj estis leteramikoj kaj ankaŭ renkontiĝis – sed ili perdis la kontakton. **Dank’ al artikolo en Ora Ĵurnalo, ili nun denove havas kontakton.** En la septembra numero Valentin rakontos pri la **metroo de Moskvo** kaj **Magnus Löndén** invitas nin al **virtuala vojaĝo al marto! Suben aŭ supren – elektu!**

Obs! Sista dag för manus till Ora Ĵurnalo är nu den 5e i varje månad. / Rim! La lasta tago por kontribuoj al Ora Ĵurnalo nun estas la 5a de ĉiu monato. /Siv

Gunnel Nilsson de Älvsbyn forpasis.

**Kiam ŝi havis 90 jarojn, ŝi startis
esperanto-kurson. Ŝia amikino
Ann Westin skribas pri ŝi.**

*Mi mallongigas la rakonton por havi lokon por du
lingvoj. Mi neniam renkontis Gunnel, sed ni havis
longajn babilojn telefone, kaj mi miris ŝian
entuziasman agadon en tre alta aĝo. /Siv*



Gunnel Nilsson, Älvsbyn

18/10 1925–15/6 2020

Första gången jag träffade Gunnel var för 25 år sedan. Min pappa var god vän med hennes man Hjalmar och en gång när jag tillsammans med pappa besökte våra gamla hemtrakter i Norrbotten blev vi hembjudna till Gunnel och Hjalmar. Trots ålderskillnaden, jag är jämgammal med hennes son, fick vi bra kontakt.

Vi fortsatte sedan att ringa och skriva till varandra och varje gång jag kom till Älvsbyn var ett besök hos Gunnel obligatoriskt.

Hon var alltid optimistisk och aldrig rädd att prova nya vägar. Om hon upplevde att något inte var som det skulle var hon inte rädd för att försöka göra något åt de.

Hon var en flitig besökare hos makthavare och skrev många insändare och reportage i lokalpressen.

Gunnel var liksom jag bilkårist men hon var även lotta och tongivande i Älvsby Lottakår.

Midsommarveckan 2016 bestämde sig Gunnel tillsammans med tre vänner inom Älvsby Lottakår att börja lära sig esperanto, Gunnel var då fyllda 90.

Studierna fick en flygande start. Lotta Lauritz från Svenska Esperantoförbundet bjöd in till brunch för att diskutera Esperanto och studieförbundet NBV backade upp med studiematerial. Luleå Esperantosällskap bytte

Gunnel Nilsson, Älvsbyn

18/10 1925–15/6 2020

La unuan fojon kiam mi renkontis Gunnel estis antaŭ 25 jaroj. Mia patro estis amiko de ŝia edzo Hjalmar, kaj foje, kiam mi kune kun mia patro vizitis niajn malnovajn hejmgregionojn en Norda Botnio, ni estis invitataj al Gunnel kaj Hjalmar. Malgraŭ la aĝodiferenco, mi estas samaĝa kun ŝia filo, ni ekhavis bonan kontakton.

Ni pludaŭris telefoni kaj skribi unu al la alia kaj ĉiun fojon kiam mi venis al Älvsbyn vizito al Gunnel estis "deviga".

Ŝi ĉiam estis optimista kaj neniam timis provi novajn vojojn. Se ŝi spertis ke io ne estis en bona ordo, ŝi ne timis fari ion por helpi.

Ŝi estis ofta vizitanto ĉe la aŭtoritatuloj kaj skribis multajn leteron al la redaktoro kaj faris raportojn en la loka gazetaro.

Gunnel estis aŭtokorpusano kiel mi kaj ankaŭ kantunistino donante la tonon en la kantunistina grupo de Älvsbyn.

Dum la somermeza semajno en 2016 Gunnel – kune kun tri amikinoj en la kantunistina grupo de Älvsbyn – decidis komenci lerni Esperanton. Gunnel tiam estis 90-jara.

La studoj flugkure komenciĝis. Lotta Lauritz de SEF invitis al frua lunĉo por diskuti Esperanton, kaj la studorganizo NBV apogis per studmaterialo. La Esperanto-Societo de

namn till Norrbottens Esperantosällskap och etablerades på Facebook.

Esperantoförbundets vice ordförande, Ann-Louise Åkerlund besökte Älvsbyn och esperantisterna efter tips från en turist som sett reklam utlagd på biblioteket.

Esperanto var ingen ny bekantskap för Gunnel, hennes mamma var esperantist redan på 1920-talet. Gunnel har själv sagt att hon trodde språket var dött men efter allt hon läst och efter alla kontakter hon fått blev hon medveten om att Esperanto lever i allra högsta grad.

En av Gunnels nya kontakter känner jag mig skyldig till. Några av medlemmarna i Göteborgs Esperantosällskap är liksom jag medlemmar i Västsvenska författarsällskapet och när Gunnel berättade för mig att hon skulle börja läsa esperanto var jag inte sen att tala om det för bland andra Siv Burell. Gunnel uppskattade kontakten, hon tyckte konversationerna på esperanto med Siv var givande och gav bra övning även om hon erkände för mig att hon fortfarande betraktade sig som nybörjare och en och annan gång behövde anlita ordboken.

Vi är många som kommer att sakna Gunnel och hennes engagemang.

Om jag någon gång tyckte att det fanns för många pessimister och bakåtsträvare i min omgivning räckte det med ett telefonsamtal till Gunnel för att jag skulle bli på bättre humör. Världen har blivit en energispruta och eldsjäl fattigare.

Ann Westin

Luleå ŝanĝis nomon al La Esperanto-Societo de Norda Botnio kaj establiĝis en Facebook.

La vicprezidanto de SEF, Ann-Louise Åkerlund, vizitis Älvsbyn kaj la esperantistojn post sugesto de turistoj, kiu vidis reklamon metitan en la bibliotekon.

Esperanto ne estis nova konato por Gunnel. Ŝia patrino estis esperantisto jam en la 1920a jardeko. Gunnel mem diris, ke ŝi pensis ke la lingvo estas mortinta, sed post ĉio, kion ŝi legis kaj post ĉiuj kontaktoj, kiujn ŝi ricevis, ŝi konsciis ke Esperanto vivas en plej alta grado.

Pri unu el la novaj kontaktoj de Gunnel, mi sentas min kulpa. Kelkaj membroj de Esperanto-Societo de Gotenburgo estas, kiel mi, membroj en Västsvenska Författarsällskapet (Okcidentaveda Societo de Verkistoj), kaj kiam Gunnel rakontis al mi ke ŝi komencos studi Esperanton, mi ne malfruis mencii tion al i.a. Siv Burell. Gunnel aprezis la kontakton, ŝi pensis ke la konversacio esperante kun Siv estis inspiraj kaj donis bonan ekzercon, eĉ se ŝi konfesis al mi, ke ŝi ankoraŭ rigardas sin komencanto kaj foje bezonas uzi la vortaron.

Ni estas multaj, al kiuj mankos Gunnel kun ŝia engaĝiĝo.

Se mi foje pensis ke estas tro da pesimistoj kaj malantaŭen-strebantuloj en mia ĉirkaŭantaro, sufiĉis per telefona interparolo kun Gunnel por havi pli bonan humoron. La mondo fariĝis pli malriĉa per la perdo de energiulo kaj entuziasmulo.

Ann Westin

La vorto "lotta" tradukita en kelkajn lingvojn

Eble la vorto "Lotta" ne troviĝas en aliaj landoj. Google erare tradukis per loterio en la germanan, anglan, francan, danan kaj norvegan.

En Esperanto "lotta" fariĝis varfo = brygga (en haveno). Kial????

Kanske finns inte ordet "lotta" i andra länder. Google översatte det felaktigt med "lotteri" till tyska, engelska, franska, danska och norska.

På esperanto blev det av någon anledning "varfo" = brygga (i en hamn). Varför???

Se oni enmetas la vorton en frazon boniĝos, sed la vorto ne estas tradukita per unu vorto, sed tradukita per klariga frazo.

En la vortaro de Ebbe Vilborg "lotta" estas tradukita per la vorto "kantinistino", sed la plejparto de "lottor" tute ne okupas per kuirado.

En 1964–65 mi estis "lotta" en "aer-milit-defend-konduk-servo". Pli poste la radaro transprenis nian taskon malkovri fremdajn aviadilojn.

Sube sekvas la rakonto pri mia "militanta juna vivo". Nuntempe mi estas paca dank al Esperanto. 😊

Om man sätter in ordet i en mening blir det bättre, men ordet blir inte översatt med ett ord, utan med en förklarande mening.

I Ebbe Vilborgs ordbok översätts ordet med Kantinistino = kvinna i marketenteriet, men de flesta lottor arbetar inte med matlagning.

1964–65 var jag lotta i luftvärnsstridledningstjänst. Senare tog radarn över uppgiften att upptäcka främmande flygplan

Nedan följer berättelsen om mitt militanta unga liv. Numera är jag fredlig tack vare esperanto. 😊



La bildo ne montras min, nur la tipo de uniformo, kiun mi portis.



Simbolo por la Sveda korpuso de "lottor". Lotta-korpusoj estas volontula militorganizo por virinoj je ĉiuj aĝoj. Ĝi estis fondita en 1925. La ĉefa oficejo situas en Stokholmo.

Mi estis juna kaj iomete imponita de uniformoj. En Åstön ekster la urbo Hernusando oni aranĝis 2–3-semajnan kurson por estontaj "lottor".

Tiam mi loĝis en Gnesta, sude de Stokholmo kaj kiel instruisto mi havis longan ferion.

Vestita en uniformvesto kaj vaska ĉapo, mi alvenis al Åstön. Estis posttagmeze kaj ni – 30 virinoj – ricevis dormlokojn en duetaĝaj litoj en granda konstruaĵo.

Post la vespermanĝo ni havis la unuan lecionon. Ĉarma leŭtenanto provis instrui nin

Jag var ung och lite imponerad av uniformer. På Åstön, utanför staden Härnösand ordnades en 2–3-veckorskurs för blivande lottor. Då bodde jag i Gnesta, söder om Stockholm, och hade som lärare ett långt sommarlov.

Klädd i uniformsdräkt med basker, kom jag till Åstön. Det var eftermiddag och ni – 30 kvinnor – fick sovplatser i tvåvåningssängar i en lång byggnad.

Efter kvällsmaten hade vi första lektionen. En charmig löjtnant försökte lära oss marschera. En svår uppgift! Några fnissade, andra nästan

marŝi. Malfacila afero! Kelkaj subridis, aliaj preskaŭ "dancis" anstataŭ marŝi.

En la granda loĝejo ni poste diskutis la aferon kaj interkonsentis ke ni helpu la ĉarman leŭtenanton.

La sekvan tagon ĉiuj marŝis laŭ takto kaj ricevis laŭdon de la leŭtenanto. Ni eĉ obeis la komandajn vortojn.

Miaj memoroj de tiu kurso paliĝis kun la tempo. Ni havis sufiĉe la libertempo kaj naĝis en la Balta Maro.

Foje ni devis uzi gasmaskojn. La tasko estis iri / grimpi tra tunelo kun larmiga gaso.

Jes, ja, la maskoj fakte protektis nin.

En la klasĉambro ni lernis iomete pri aviadiloj. Ni sidis kun nigra skribilo en la mano kaj aŭdiloj sur la oreloj. Oni imagis ke la voĉoj en la aŭdiloj venis de diversaj gvatturoj, kie sidis "lottor".

Nia tasko estis desegni sur travidebla map-tabulo de kie kaj kien la aviadiloj flugis.

Ĉe la alia flanko sidis fluggvidanto (de tempo al tempo). Ekz. ni desegnis ke aviadilo flugis de Bertil 2 en la direkton Erik 5. (B2 → E5)

Okazis ke ni ankaŭ skribis kodajn vortojn – aŭ ciferojn kaj ni ĉiam skribis per "spegula skribo" por ke la fluggvidanto rapide kaptu la informon. Li (ĉiam estis li) havis sekretan libreton kun probablaj solvoj de la kriptaj.

Estis interesa kurso, sed mi estas danka ke mi reale neniam devis uzi, kion mi lernis.

Kelkaj ankaŭ lernis pafi per pistolo. Mi lernis la arton pli poste ĉe la pistolpafklubo de la policistoj en Gnesta, kie mia estonta edzo estis membro. En sabla ebenaĵo ekster la urbeto ni pafis al tabulo 30 metrojn for – se mi ĝuste memoras.

Neniu uzis aŭdprotektilojn – eble tiaj tiam ne troviĝis.

Tre stulte ludi militon, ĉu ne?

/ Siv

dansade i st.f. att marschera. I det stora logementet diskuterade vi sedan läget och kom överens om att vi skulle hjälpa den charmige löjtnanten.

Följande dag marscherade vi alla i takt och fick beröm av löjtnanten. Vi t.o.m. lydte kommandoorden.

Mina minnen av den kursen har med tiden bleknat. Vi hade ganska mycket fritid och badade i Östersjön.

En gång måste vi använda gasmask. Uppgiften var att gå / krypa genom en tunnel med tårgas.

Ja, maskerna skyddade oss faktiskt.

I lektionssalen lärde vi oss en del om flygplan. Vi satt med en svart penna i handen och hörlurar på öronen. Man tänkte sig att rösterna i hörlurarna kom från olika flygtorn, där det satt lottor.

Vår uppgift var att rita på en genomsiktig karttavla varifrån och vart flygplanen flög.

På andra sidan satt en flygledare (ibland). Exempelvis ritade vi att ett flygplan flög från Bertil 2 i riktning mot Erik 5 (B2 → E5)

Det hände att vi också skrev kodord – eller siffror och vi skrev alltid i "spegelskrift" för att flygledaren snabbt skulle uppfatta informationen. Han (det var alltid en han) hade en krypteringsbok med troliga lösningar på krypteringen.

Det var en intressant kurs, men jag är tacksam över att jag aldrig på riktigt behövde använda mig av vad jag lärt mig.

En del lärde sig också skjuta med pistol. Jag lärde mig konsten lite senare i polisens pistolskytteklubb i Gnesta, där min blivande make var medlem. På en grusig äng utanför samhället sköt vi mot en tavla på 30 meters avstånd – om jag minns rätt.

Ingen använde hörselskydd – kanske fanns det inte sådana då.

Mycket dumt att leka krig, eller hur?

/ Siv

Sprida Esperanto – viktigt och nödvändigt!



Folke Wedlin, Göteborg, säger:

Svenskar i allmänhet tycks vara övertygade om att hela världen är engelskspråkig, att man inte behöver kunna något annat än engelska. När det gäller den biologiska mångfalden, då vet man hur viktig den är, hur vi alla måste slå vakt om den – medan man tydligen är totalt likgiltig för den kulturella och språkliga mångfalden!

Engelska MÅSTE bekämpas – som internationellt språkligt medium! Esperanto finns och är så utprövat, har visat sig fungera i hela världen (utom i de engelskspråkiga delarna, måhända). Varför skall det vara så svårt för människor att inse detta? Voltaire sade ju ”Om inte Gud fanns, så skulle man

behöva uppfinna honom”. Man kan med samma rätt säga: ”Om inte esperanto fanns, så skulle man behöva uppfinna det!” /Folke

Jes kompreneble vi pravus, Folke! Ni bezonas Esperanton en Svedio – same kiel ĉiuloke. En Svedio la angla grandskale invadis nian lingvon. Ni volas plifortigi la svedan. Diversecon ni volas en la naturo – biologian diversecon – kaj estu en la kulturo – lingva diverseco! Esperanton ni bezonas kiel lingvoponton! Mi ĵus membriĝis al Språkförsvaret (La lingvo-defendo) (sprakforsvaret@sprakforsvaret.se) /Siv



uea.facila
FACILAJ ARTIKOLOJ EN ESPERANTO

Por komencintoj kaj daŭrigantoj troviĝas artikoloj, kiujn UEA plifaciligis. Ŝparu la ligilon <https://uea.facila.org>

Ideo: Ĉiam kunportu esperantaj broŝurojn kien ajn vi iras. Ekz. mi sidis en atendo-ĉambro, legante ”Marina” de Sten Johansson. La flegistino devis voki min dufoje – mi ne aŭdis la unuan fojon. ”Kion vi legas, kio estas tiel interese?” ŝi demandis. Survoje al la ekzamen-ĉambro mi kaptis la eblecon diri kelkajn vortojn pri esperanto. Mi ne kunhavis

broŝurojn, sed esperantan paĝosignon. Mi skribis la ligilon de nia retpaĝo kaj donis al ŝi la paĝosignon dirante kelkajn vortojn pri Ora Ĵurnalo. Por la juna flegistino Esperanto estis tute nova afero. Ĉu la tuja intereso daŭris? Mi ne scias, sed la ŝanco pligrandiĝas, se iu informas ŝin. / Siv

La Vojo de L.L. Zamenhof

Folke Wedlin proponas ke ni legu la konatan poemon
por havi kuraĝon kaj fidon al la estonteco.



*Bildo de
Pixabay*

Tra densa mallumo briletas la celo,
Al kiu kuraĝe ni iras.
Simile al stelo en nokta ĉielo,
Al ni la direkton ĝi diras.
Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,
Nek batoj de l' sorto, nek moko de l' homoj,
Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita
Ĝi estas, la voj' elektita.

Nur rekte, kuraĝe, kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L' espero, l' obstino, kaj la pacienco –
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingas la celon en gloro.

Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,
Pri l' tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas –
Ni semas kaj semas konstante.

"Ho, ĉesu!" mokante la homoj admonas –
"Ne ĉesu, ne ĉesu!" en kor' al ni sonas.
"Obstine antaŭen! La nepoj vin benos,
se vi paciencie eltenos."

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj
Velkantajn foliojn deŝiras,
Ni dankas la venton, kaj, repurigitaj,
Ni forton pli freŝan akiras.

Ne mortos jam nia bravega anaro,
Ĝin jam ne timigos la vento, nek staro,
Obstine ĝi paŝas, provita, hardita,
Al cel' unu fojon signita!

Nur rekte, kuraĝe, kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L' espero, l' obstino, kaj la pacienco –
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingas la celon en gloro.

Pri lingvoj parolataj en Finnlando



Raita Pyhälä raportas:

La sveda lingvo en Finnlando estas parolata ekde la 13a jarcento, kiam svedoj el orienta Svedio komencis transveli la maron al Finnlando. Ili setlis precipe laŭ la okcidenta kaj suda marbordo kaj en la Alanda insularo.



Finnlando kun limoj al Svedio, Norvegio, la Balta Maro kaj Rusio.

La rolo de la sveda malgraviĝas ekde la fino de la 19a jc. Nuntempe nur ĉ. 5 % el la loĝantaro de Finnlando havas la svedan kiel sian gepatran lingvon, kvankam la sveda kaj finna ambaŭ estas oficialaj lingvoj de la lando.

Dum la tempo, kiam Finnlando estis Granddukejo de la Rusa Imperio, la rusa lingvo ne vere sukcesis enradikiĝi.

Gravan kulturan rolon havis la germana.

La ununura indiĝena popolo, sameoj, rajtas uzi kaj studi sian lingvon, sed ne estas facile revivigi ĝin pro la malpermesoj kaj antaŭjuĝoj, kiuj antaŭ kvindeko da pli da jaroj regis.

Finnlando provis iom antaŭenigi ciganan lingvon, sed pli kaj pli miksiĝante kun la finna ĝi malaperas. Iam ĝi estis konsiderata nur familia kaj sekreta lingvo.

Helsinki (nuna loĝantaro 655 000).

La plej grandaj parolantaroj de fremdaj lingvoj en Helsinki en 2019 estis:

rusa (18 246)
somala (10 433)
estona (10 016)
araba (7 508)

Rimarkinde estas, ke la parolantoj de la angla venas ne nur el Britio kaj Usono sed el Kanado, Aŭstralio, Barato, Afriko, Filipinoj kaj Nov-Zelando.

La ĉefa finna gazeto Helsingin Sanomat en julio 2020 intervjuis tri fremdlingvajn gejunulojn en Helsinko. Ili ĉiuj diris, ke ĉiuj iliaj lingvoj utilas kaj helpas en laborejo, sed en lernejo oni povas esti ĉikanata pro sia fremdlingveco. Bruna haŭtkoloro povas supozigi, ke la homo neniam posedas la finnan, kvankam li/ŝi naskiĝis kaj kreskis en

Finnlando kaj perfekte lernis la lingvon en lernejo. Farhia (30j) parolas la finnan kun patrino, la somalan kun patro, kaj kun geamikoj la anglan. Niko (30) parolas ruse nur kun patrino. Li iom malgajas, ke li ne trovas ruslingvajn geamikojn. Estonlingva Rony (21) parolas la estonan kun siaj parencoj, kun sia patrino la finnan miksitajn kun la estona, kaj kun siaj geamikoj la anglan.

En Finnlando nun parolatas ĉ. 160 lingvojn. La registritaj fremdlingvanoj en la tuta lando en 2019 nombris 412 700, kio estas sep kaj duonon de procentoj de la loĝantaro (5 528 008 en 2020). Kiel praktike estus, se ĉiuj havus Esperanton kiel sian duan lingvon!

/ Raita Pyhälä

Dufoje oni donis atenton al Jarl Hammarberg ĉi-somere

1) Inga Johansson trovis ligilon al Sveriges Radio/Radiofynd, kiu anoncis: *Sonja Åkesson & Jarl Hammarberg sur scenejo 1968–69.*

En "Eta Hornsberg" la poeta paro Sonja Åkesson kaj Jarl Hammarberg kune laŭtlegas

el la kolekto de poemoj "Pris" (povas signifi premion, laŭdon aŭ prezon),

<https://sverigesradio.se/avsnitt/1519692>

el Radiofynd kun Sonja Åkesson kaj Jarl Hammarberg.



2. Hodiaŭ, la 25an de julio oni menciis Jarlon en la gazeto Göteborgs-Posten.

Temas pri kopirajto. La komikisto kaj debatanto Aron Flam estas akuzita pro ŝtelo de bildo por la kovrilo de sia libro "En svensk tiger". "Tiger" havas du signifojn: a) tigro b) silentas. Dum la dua mondmilito oni per la bildo "Svedo silentas" celas: ne malkaŝu ion al la malamikoj!

Paralele la ĵurnalisto rakontas pri alia akuzo:

La pacifista gotenburga artisto **Jarl Hammarberg** ekspoziciis afiŝon pri soldato kun la teksto: "Rifuzu morti, rifuzu soldatservon" en la sama galerio, kiam nun oni povas vidi "En svensk tiger". Hammarberg estis juĝita pro ribeligo al prizona puno. Lia edzino Sonja estas konata poeto en Svedio. Ankaŭ ŝi estis "ribela". Ŝi strebis pri pli da libereco por virinoj. "Esti sklavino de blanka viro" (Vara vit mans slav) estas unu el ŝiaj plej konataj poemoj. / Siv

Esperantistoj kaj la kronviruso

TEJO faris intervjuojn kun junuloj el multaj landoj pri la kronvirusa situacio en iliaj landoj.

Spektu la jutub-filmon *Esperantistoj kaj kronviruso*:

Epizodo 1.

https://www.youtube.com/watch?v=2fpM1ci_fMk

Epizodo 2:

https://www.youtube.com/watch?v=4_nwzWUWfs4&t=3s

Epizodo 3:

<https://www.youtube.com/watch?v=zNCn-G5I-qQ>



Tenu distancon! Håll avstånd!



el Esperanto-Humuro de H-G Kaiser, Facebook

Por bonigi/ĝuigi la ĉiutagan situacion en korona kriztempo vi ĉiun semajnon povas trovi iun amuzan per ĉi tiu ligilo:

<https://www.loriot.de/index.php/corona>



Jen kanto pri la pandemio en la jida

"Mentshn-Fresser" Verkis Solomon Small (Smulewitz), kantis Sveta Kundish kaj Daniel Kahn

Hebrew Publishing Co.

<https://www.youtube.com/watch?v=RaYmQNgCtnQ>



La muzikistoj staras dise.



Legendo pri la ŝlosiloj de la ĉielo

Ĉu vi konas kiel la primolo ricevis unu el siaj nomoj? Amata infano havas multajn nomojn kaj la bela primolo estas neniu escepto.

Sed, nun mi rakontas:

Foje, kiam la tempo ankoraŭ estis nova, Sankta Petro perdis sian oran ŝlosilon. Ĝi falis tra la sep ĉielo, tra la nuboj, malsupren sur la teron kaj tie ĝi malleviĝis profunde en la teron. Estis granda akcidento – ĉu Sankta Petro nun malŝlosis la pordon al la ĉielo kaj enlasas la devojĝintajn animojn de homoj?

Sankta Petro konis nenian alian solvon ol sendi anĝelon malsupren al la mondo por serĉi la oran ŝlosilon. Sed la anĝelo ne trovis ĝin spite al grandaj penoj.

Fine, kiam la anĝelo ne plu havis esperon, li iel trovis la ŝlosilon. Li subite vidis etan flavan kaj oran floron kiu kreskis el la nigra tero. La floroj estis kiel ŝlosilaro, kaj la anĝelo komprenis la mesaĝon. Profunde malsupre en la tero, de kie la flava floro serĉis sin supren la anĝelo trovis la oran ŝlosilon de Sankta Petro.

La bela floro kiun ni nun nomas "primolo" estis ankaŭ nomita "la ŝlosiloj de Sankta Petro". Poste la floro havis alian nomon, kiu estis: "la ŝlosiloj de virgulino Maria".



Dum la pagana tempo la floro nomiĝis "la ŝlosiloj de Freja". Freja estis la diino de fekundeco kaj la primolo estis la speciala kuracplanto por la "virina problemo". Estis ankaŭ ebla fari ŝmirajon por la beleco de haŭto.

Ĉu vi trovis la primolon kiu staris en la "pordo de printempo"?

/ Ingegerd

Jan Hellström raportas pri "montegoj" en Vättlefjäll (montaro nordoriente de Gotenburgo)

Hej!

Även om jag bor på Hisingen och inte i Norrland, så har vi områden i närheten med fjäll i namnet.

På kvällen den 11/6 blev det en tur till Jennylund i Bohus med en promenad på 4,9 km in i nattskärrans rike. GOF (Göteborgs Ornitologiska förening) skulle enligt programmet haft en vandring för vardagslediga den kvällen. Men vandringarna

Saluton!

Eĉ se mi loĝas en Hisingen kaj ne en Norrlando, ni tamen havas areojn en la proksimeco kun "montego" (fjäll) en la nomo.

La vesperon de la 11a de junio ni faris ekskurson al Jennylund en Bohus kun piedirado je 4,9 km en la regno de la kaprimulgo. Laŭ la programo, GOF (La ornitologa klubo de Gotenburgo) havus promenon ĉi-tiun vesperon por la labortage



är ju inställda pga coronan, men vi var tre som gick här kl 20:25–23:20.

I början på en ridväg såg vi bl.a. en taltrast med mat i näbben. Den hade nog hungriga ungar i tanken. Vid ett nedlagt grustag räknade en gulsparv till sju och göken hördes. Vi passerade en f.d. djurpark (på sin tid Sveriges största djurpark). I en damm låg en kniphona och två gräsandhannar landade. I en inhägnad gick 2 getter. Svarthättans sång hördes och en ringduva spelflög.

Vi passerade genom barrskog och tog av på en stig till en tjärn för fika i väntan på nattskärretid. På den blanka vattenytan i tjärnen rörde sig vattenskräddare. Knotten gjorde sig påmind. Strax före 22 var det dags att gå tillbaka till huvudstigen och uppför en brant backe upp på ett bergskrön.

Vi gick vidare en bit och upp på en bergknalle med utsikt över Vättlefjäll. En morkulla spelflög och en gök gol i närheten. Det blåste något här uppe. Exakt kl 22:15 hörde vi en nattskärra surra. Vi drog oss tillbaka till backkrönet och inväntade nattskärrans flyguppvisning. Minst 2 nattskärror spelade.

Efter ett tag hörde jag flyktljudet och en nattskärra kom flygande som en papperssvala några meter ifrån oss. En njutobs! Solen hade

liberaj membroj. Sed la piediradoj ja estas nuligitaj pro la korono, sed ni tamen estis tri personoj, kiuj iris tie inter 20:25 kaj 23:20 horoj.

Komence sur rajdvojo ni i.a. vidis kantturdon kun nutraĵo en la beko. Ĝi certe pensis pri malsataj idoj. Ĉe eksa gruzfosejo flava emberizo kalkulis ĝis sep kaj la kukolo aŭdiĝis. Ni preterpasis eksan zoologian ĝardenon (kiu siatempe estis la plej granda de Svedio). En laĝeto kuŝis klangulino kaj du platbekaj anasoj descendis. En ĉirkaŭbarilo iris du kaproj. La kanto de la nigrakapa silvio aŭdiĝis kaj ringokolombo ludflugis amindume.

Ni pasis tra konifera arbaro kaj turnis en padon al arbara laĝeto por kafumado atendante la tempon de la kaprimulgo. Sur la rebrila surfaco de la arbara laĝeto hidrometroj moviĝis. La kuletoj atentigis nin pri sia ĉeesto. Baldaŭ antaŭ la 22a h. estis tempo reiri al la ĉefvoĵeto kaj supren sur kruta deklivo al montokresto.

Ni pluiris etan distancon kaj supren al mont-roketo kun panoramo de la montaro Vättlefjäll. Skolopo ludflugis kaj kukolo blekis en la proksimeco. Blovetis ĉi tie supre. Ekzakte je la 22.15 h. ni aŭdis zumantan kaprimulgon. Ni reiris al la kresto de la

gått ned, men det var fortfarande rätt ljust så vi såg den fint. Insekterna var lite irriterande. Vi gick nöjda tillbaka och hörde flera nattskärror vid en kraftledning. En annan morkulla flög lågt över oss.

Kan nämnas att en varg rörde sig i området några dagar tidigare, men den såg inte vi.

Samerna har en kåta i Vättlefjäll och scouterna har en stor anläggning vid samma sjö som samerna.

Hälsningar i sommarnatten från

Jan



deklivo atendente la flugprezentadon de la kaprimulgo. Almenaŭ du kaprimulgoj ludis.

Post momento mi aŭdis la flugsonon kaj kaprimulgo venis flugante kiel papera hirundo kelkajn metrojn for de ni. Ĝuinda afero! La suno estis subenirinta, sed ankoraŭ estis sufiĉe hele kaj ni vidis ĝin bone. La insektoj estis iomete iritantaj. Ni reiris kontentaj kaj aŭdis kelkajn kaprimulgojn ĉe elektra konduktolineo. Alia skolopo flugis malalte super ni.

Estas direnda ke lupo sin movis en la areo kelkajn tagojn antaŭe, sed ĝin ni ne vidis.

La sameoj havas kabanon en Vättlefjäll kaj la skoltoj havas grandan establon ĉe la sama lago kiel la sameoj.

Salutojn en la somera nokto de Jan

Den 2/5 fick vi ett ovanligt besök i Hökälla våtmarkspark, en vit stork. Jag tror det är första gången i det området. Den gick och födosökte i närheten av Hökälladammen. I Skandinavien häckar den bara i Danmark och Skåne.
/Jan Hellström

En 2/5 ni havis nekutiman viziton en la lagetriĉa tereno de Hökälla: blanka cikonio. Por la unua fojo en tiu areo (norde de Gotenburgo), mi kredas. Ĝi iris serĉante nutraĵon proksime de la diglageto de Hökälla. En Skandinavio ĝi kovas idojn nur en Danlando kaj en Skanio.
/Jan Hellström



Feria rememoro el Germanio

de Monica Eissing

Pluvtorento en Warderbrück

Ni kampadis en la vilaĝo Warderbrück, norda Germanio.

La posttagmezo estis varma kaj oni sentis la premon en la aero. Ni cerbumis pri forpreno de la antaŭtendo de la ruldomo.

Tiam je la kvara horo, venis la unua pluvego, kiu estis normala. La dua venis antaŭ la sesa horo. Tiam komencis plui tre malrapide, transpasis al forta pluvtorento da pluvaj gutoj, kiuj estis grandaj kiel hajleroj kaj klakadis kaj al la tegmento kaj al la fenestro de la klinita ruldomo. Ĝi daŭris dum

kvaronhoro kaj poste estis trankvila kaj normala pluvo.

La aero en la ruldomo estis prema kaj neeltenebla. Ni vidis tra la fenestro al la antaŭtendo, kiu estis inundita de la pluvo. Patro eliris kaj vadis en la akvo. Ne estis eble iri tie kun lignoŝuoj ĉar ili estus tute malsekaj.

Dum la vespero mi vidis kaj aŭdis, ke estis kvazaŭ eta truo en la tero, kie la tuta akvo malaperis. Mia patrino kaj mi iris laŭ la muro de la ruldomo. Tie ne estis multe da akvo.

La sekva tago estis seka. Tial ni do povis forpreni la antaŭtendon.

Tante Maria

germana virino, kiu amis infanojn – kaj hundojn

Mi elkreskis en Gunnilse, eta vilaĝo kun granda sablofosejoj kaj brikfabriko.

Loko en evoluo post la fino de la dua mondmilito! Mia patro laboris en unu el tiuj sablofosejoj. Li estis dungita kiel riparisto, sed ankaŭ faris multe da aliaj taskoj: kondukis kamionojn, fosmaŝinon, prizorgis la silon kaj ŝarĝbendojn, kiuj fortransportis la sablon. Dum la paŭzoj oni ludis ŝakon. La sablofosejoj kaj la brikfabriko estis la grandaj laborejoj en Gunnilse.

En la fantazie konstruita flava domo kontraŭ nia domo loĝis familio kun la nomo Möhrpahl. Ili luigis ĉambron en la baza etaĝo al variaj laboristoj de la brikfabriko aŭ al iu el la sablofosejoj.

En alia apartamento en la sama domo loĝis Alice kaj Algot. Ili havis filinon, kiu nomiĝis Ingrid kaj estis edziniĝinta al Kurt, kiu estis oficisto en Volvo. Li ne similis al aliaj patroj. Li portis pantalonon kun akraj gladfoldoj, blankan, sengladan ĉemizon kun nigra



Tante Maria kaj ŝia hundo Rubin.

mallarĝa kravato. Li ĉiam estis elegante vestita. Ilia filino nomiĝis Pia. Ŝi estis unu jaron pli maljuna ol mi.

Kiam ili vizitis nin Pia volis ludi kun ni, la aliaj infanoj. Ŝi estis pli delikata ol ni, venis de la urbo, portis robon kaj ŝajnis ĉiam novbanita. Ni aliaj estis malpuraj kaj plenaj je vundoj kaj gluplastroj post senbridaj ludoj.

Ni estis multaj geknaboj de ĉiuj aĝoj kaj ni ludis de mateno ĝis vespero, se eblis.

Pluraj el la familioj de Gunnilse devenis el Germanio. Hans, nomita Hanne, kaj lia edzino Maria havis du knabojn, Klaus Dieter kaj Gunther. Gunther naskiĝis ĉi tie. Mia patrino tenis Gunther dum la baptado, kaj mi komprenis, ke estis tre miriga por ŝi.

Tante Maria amis infanojn kaj estis ĉiam surloke por doni konsolon kaj helpon. Tion ankaŭ faris mia patrino, sed sentis tiel bone,

*La flava domo kontraŭ la nia.
Tante Maria loĝis en la unua etaĝo.
Estis tre stranga domo por infanoj.*



kiam oni – post falo aŭ malamikiĝo al iu, aŭdi Tante Maria, parolante kun fremda akcento, diri: "Nu, veni vi al Tante Maria!" Ŝi aŭskultis, babilis, viŝis larmojn kaj baldaŭ ĉiu malĝojo estis for.

Klaus, kiel oni nomis lin, estis unu jaron pli malaĝa ol mi kaj ni estis tre bonaj amikoj. Mi ofte vizitis Möhrphals kaj ofte li estis ĉe ni. Ni ambaŭ ŝatis legi, kaj librojn, kiujn ni estis donitaj, ni pruntis unu al la alia. Mi legis Bomba kaj Tarzan de la eldonejo Wahlströms kaj Klaus legis miajn Kitty-librojn. Poste ni babilis pri kio estis bona aŭ malbona. Hanne kaj Maria ankaŭ legis. Bonege ke la providenco lokigis rifuĝintan familion kun intereso por legi en la kontraŭa domo.

/ Ingegerd



Miaj infanaĝaj amikoj Klaus-Dieter kaj Günther, la filoj de Tante Maria.

Plej dekstre staras Tante Maria, maldekstre estas sia fratino kaj meze la praavino "Oma".

Tante Maria estis nova en Svedio kaj juna.



*Tante Maria kun mia frato Karl-Henry.
Tante Maria donis amikecon dum la tuta vivo al nia familio.*

*Kiam mia patrino estis olda kaj malsana
Tante Maria estis ĉiam tie.*

Klaus-Dieter kaj mi ludis glacihokeon sur ĝibeca glacio dum vintra ludo.





Mia naskiĝtago. Tante Maria distranĉas la torton prizorgante ke ĉiu havu pecon je la sama grandeco.

Somera ludo - Pia kaj mi ludas badmintonon. Estis someraj ferioj.



Du kantistoj, kiujn ŝatis Tante Maria

Dum mia infanaĝo Tante Maria rakontis pri la germana kulturo, libroj kaj la muziko, kiujn ŝi ŝatis. Precipe tiun **Freddy Quinn** ŝi ŝatis. La germana lingvo estis grava afero por ŝi. Ŝi instruis al mi kaj parolis la germanan lingvon kun mi.

1. Freddy Quinn kantas "Seemann":

<https://www.youtube.com/watch?v=B-SVP6i9tbk&list=PLZNJ3NralwOq5Xh0YEV9HUiAPvwVjQgg9>



2. "The King" Elvis Presley ankaŭ kantis germane.

Elvis Presley, la fama kaj persona kantisto dum la malfrua 20a jarcento, naskiĝis la 8an de januaro en 1935 en Tupelo, Mississippi.

Li nomiĝis "The King", sed lia vera nomo estis Elvis Aaron Presley.

Kiu ne memoras Elvis kantante "Jailhouse rock", "That's All Right", "Are you lonesome tonight", "Love me tender", kaj "How great thou art"? Tiuj kantoj daŭre kantas en mia koro kun la voĉo de Elvis.

Li faris sian militservon 1958–1960 kiel ordinara soldatservanto en Usono, kaj post la edukado li servis en Germanio.

Elvis edziĝis kun Priscilla la 1an de majo en 1967, kaj havis la filinon Lisa Marie Presley la 1an de februaro en 1968.


Elvis Presley mortis la 16an de aŭgusto en 1977 kiam la koro finis bati.

Li estis entombigita en sia amata Graceland.

Ĉiu bela fabelo ĉiam finas tro frue...

/ Ingegerd

Jen afiŝo pri unu el la prezentadoj de Elvis en Germanio. Tante Maria aparte ŝatis kiam Elvis kantis germane.



Germanaj proverboj

Maljuna bovino facile forgesas ke ŝi iam estis bovido.

Ju malpli da edukado, des pli da iluzioj.

Unu fojo estas neniu fojo.

Se iu diras ke li ne zorgas pri la mono sed la principo, tiam zorgas li ja pri la mono.

Willy Burgemeister, fervora esperantisto kun civitaneco en kvin landoj

Sur la bildo: Håkan Bürgemeister, la dua filo de Willy, kun sia edzino Agneta. Survoje de Åmål al Vårgårda ili haltis en Gråbo por doni al la esperanto-biblioteko en Stannum esperantolibrojn, kiujn iam posedis Willy Burgemeister.

Håkan rakontas:

Mia patro Willy naskiĝis en 1908 en Warnsdorf, Ĉeĥio, kiu tiam estis parto de la imperio Aŭstrio-Hungario. La imperiestro estis Frans Josef.

Do, la unua civitaneco de Willy estis de Aŭstrio-Hungario. Kiam Ĉeĥio kune kun Slovakio formis propran ŝtaton, li ricevis ĉeĥan civitanecon.

Dum la intermilita tempo Willy estis en Svedio kaj gvidis esperanto-kursojn diversloke, sed reiris al Ĉeĥio.

En 1939 Germanio okupis parton de Ĉeĥio, la t.n. Sudet-Deutschland – kaj Willy ricevis germanan civitanecon.

Kiam li ekhavis ordonon al militista servo, li rifuzis.

En Svedio li gvidis antaŭe kursojn pri la germana por policistoj. Kelkaj policistoj helpis al Willy veni al Vermlando. Li venis per helpo de t.n. Nansen-pasporto. Nansen estas konata kiel arkta esploristo, sed eble li faris pli por la homaro, kiam li estis dungita en la Ligo de Nacioj (nuntempe nomata La Unuiĝintaj Nacioj). Li respondecis pri rifuĝintoj kaj ekhavis la ideon krei pasportojn por rifuĝintoj, por ke ili povu forlasi Germanion. En 1922 Nansen ricevis la Nobel-premion pri Paco.



La pasportoj estis speco de "pasporto de senŝtataloj" – kaj Willy do ricevis sian kvaran civitanecon.

Post tempo Willy Burgemeister riĉevis svedan civitanecon – sian kvinan civitanecon. Li parolis multajn lingvojn: la ĉeĥan, la germanan, la francan, la anglan, la svedan kaj Esperanto. En Åmål li fariĝis instruisto pri la germana kaj la angla. Li ankaŭ havis postenon kiel ĉefo pri eksporto ĉe Waso-verken, Åmål. La firmao produktis ŝlosmekanismojn por stirradoj kaj benzinujoj.

Antaŭe – en 1930–1931 – li bicikle faris studvojaĝon tra 16 landoj en Eŭropo kaj norda Afriko. De 1931 li restadis en Svedio kaj

en 1936 li geedziĝis kun Vera Håkansson el Åmål.

En Svedio li faris proksimume 150 publikajn paroladojn kaj donis 40 kursojn por komencantoj kaj daŭrigantoj. Li vere logis homojn al esperantokursoj.

Jen dankarto de svedaj gelernantoj en Ekshärad en 1931.

Elstara instruisto ricevis dankkartojn de la gelernantoj:



Libreto farita de dankemaj gelernantoj en la Esperanta kurso en Munkerud:

La unua paĝo.

La dua paĝo:

Portreto de Willy kun buklaĵ haroj.





Paĝo 3:

I. Novnaskita.

II. Adiaŭ kara hejmo!

III. Mi biciklos en la tuta mondo.

Paĝo 4-5:

En Aŭstrio, Italio, Hispanio, Afriko, Francio, Germanio kaj Svedio kaj sekvis subskribo de 40 partoprenintoj. Kia granda klaso!!!!



Multe da prelegoj:



Kaj fine... Willy Burgemeister skribis libron pri sia biciklaj rondiroj en Eŭropa kaj Norda Afriko.

Mi ricevis ĉi-tiun valoran libreton. Sur la sekvantaj paĝoj vi trovas lian rakonton.


Se vi volas kontakton kun Håkan Bûrgemeister por ekscii pli – skribu al li:

burgemeister.hakan@telia.com


Tel. +46-70-691 73 60

/ Siv

PS. Eble vi rimarkis ke Willy Burgemeister skribis sian nomon sen ŭ-punktoj, kaj ke Håkan skribas kun ŭ-punktoj.



Vojaĝo per biciklo tra 16 landoj en Eŭropo kaj Nordafriko



A a	B b	C c	D d
Ŋ a	Ɔ b	Ɔ c	Ɔ d
E e	F f	G g	H h
Ɔ e	Ɔ f	Ɔ g	Ɔ h
I i	J j	K k	L l
Ɔ i	Ɔ j	Ɔ k	Ɔ l
M m	N n	O o	P p
Ɔ m	Ɔ n	Ɔ o	Ɔ p
Q q	R r	S s	T t
Ɔ q	Ɔ r	Ɔ s	Ɔ t
U u	V v	W w	X x
u u	Ɔ v	Ɔ w	Ɔ x
Y y	Z z	À à	Ä ä
Ɔ y	Ɔ z	À à	Ä ä
Ö ö			
Ɔ ö			

La libreto ampleksas 80 paĝojn kaj estas skribita per fraktura skribo. Mi tralegis ĝin, kaj jen estas kion mi kaptis el la interesa enhavo.

Willy Burgemeister faris la vojaĝon 1930–1931. Willy ne volis fari sian militservon en Ĉeĥoslovakio. Do, li decidis fari biciklan vojaĝon dum unu jaro. La vojaĝo komenciĝis en junio 1930.

Lia biciklo estis tre taŭga kaj fortika de la marko Siker. Li eĉ reklamas por la firmao en sia libro. En la urbo Salé en Maroko li vizitis la agentan entreprenon de Siker kaj ricevis dutagan laboron en la firmao. Li tradukis germanajn leterojn en la francan kaj li kalkulis pundojn al frankoj kaj faris registrojn.

De tempo al tempo mi demandis min – kiel Willy povis vivteni sin dum la vojaĝo. Okazis ke li iris al poŝtejoj, eble por preni monon. Li ankaŭ vizitis multajn esperantistojn kaj prelegis se estis esperanto-kunveno en la aktuala urbo. Kelkaj invitis lin al tagmanĝo kaj aranĝis tranoktojn por li. Poŝtelefonoj ja ne troviĝis kaj li ne skribis aŭ telefonis antaŭ sia alveno. Tamen ŝajnas ke li ofte renkontis esperantistojn.

Li skribis taglibron kaj la libreto havas eltirojn de tiu taglibro. Hispanio, Francio kaj certe ankaŭ aliaj landoj havis sistemon por helpi vojaĝantojn. Oni anoncis sin ĉe policejo kaj ekhavis etan monsumon kaj tranoktejon ie. Povis esti en monaĥejo aŭ en malmultekosta gastejo. Ofte estis pli ol unu vojaĝanto en la sama ĉambro. Foje li dormis en aŭto en aŭtejo, foje en ĉambro sen fenestroj. Kelkaj ĉambroj estis agrablaj, aliaj malpuraj kaj kun matraco, sed sen kovrilo.

En Hispanio li renkontis multajn ciganojn. En Nordafriko li renkontis multajn soldatojn el la Fremdula legiono. Ĉie estis scivolemaj infanoj. Pano, lardo kaj fruktoj estis sufiĉe malmultekostaj nutraĵoj, kiujn li manĝis survoje. Ŝajnas ke li ne longe restis sur unu loko. Li spektis la vidindaĵojn kaj pluiris.

En Nordafriko okazis, ke ŝoforoj de kamionoj haltis kaj Willy kune kun la biciklo veturis sur la ŝarĝoplanko. Ofte la vojoj estis malebenaj, li maltrankviliĝis pri la bonfarto de la biciklo.

Foje arabo, sidanta en aŭtobuso, etendis sian brakon, metis ĝin sur la dorso de Willy kaj Willy ne bezonis pedali dum kelkaj kilometroj.



Pri la araba kulturo li estis skeptika. Promenante tra mallarĝaj, malpuraj stratetoj li estis ŝokita vidi tiom da malriĉeco. Male li ŝatis paroli la germanan kaj la francan kun soldatoj de la fremdula legio. Li eĉ vizitis iliajn kazernojn kaj manĝis kune kun ili.

Pri la vetero Willy kompreneble tre interesiĝas. Foje li estas tute malseka pro pluvego. Foje la biciklo estas argilkota kaj foje li ne povis bicikli pro amaso da neĝo – en Alĝerio!

Eĉ se li renkontas agrablajn personojn, kiuj volas ke li haltu unu aŭ du tagojn pli – li neniam restas longtempe ie.

Ŝajnas ke Hispanio estis la plej ŝatata lando kaj Alĝerio la plej malŝatata de Willy. En Hispanio li spektis la celebradon de Kristnasko – unue sola, sed poste kun esperantistoj.

En Alĝerio oni faris novan leĝon kiu malebligis al turistoj veni en la landon. Willy estis kaptita kaj post du horojn li devis forlasi la landon. Li enŝipiĝis en ŝipo kiu unue venis al Barcelono, kie la hispanoj elŝipiĝis, kaj poste al Marsejlo, kie li elŝipiĝis. Li estis malforta post marmalsano. Pro manko de mono li nur

havis lokon sur la ferdeko kaj ne povis havi protekton kontraŭ la pluvego, stormo kaj fulmotondro. Fakte estas la unua fojo, kiam li estis malsana dum la tuta vojaĝo.

“Estis miaj 40 plej suferigaj horoj de mia vivo”, li skribis. La ŝipo ruliĝadis. Post tri tagoj en Marsejlo li sentis sin pli bone.

Bicikli la tutan vojon al Prago estis tro granda defio. Li vojaĝis per trajno al sia hejmo. Li volis surprizi sian familion, sed vojaĝkunulo sendis “rapidan karton” al ili kaj ĉe la fervoja stacidomo staris lia tuta familio kaj konatuloj. La elpensita vojaĝo de Willy estis iomete mallongita pro la “Alĝeria afero”. Li ja ankaŭ intencis bicikli tra Italio.

Fine en la libreto Willy vicigas la landojn, kiuj li trapasis: Bohemio, Mähren, Nieder-Österreich, Slovakio, Hungario, (en Jugoslavio:) Slovenio, Serbio, Bosnio, Hercegovino, Dalmatio kaj Lika (?), Kroatio, (en Aŭstrio:) Steiermark, Salzburg, Tirolo, Vorarlbergo, poste Liĥtenŝtejno, Svisio, Francio, Monako, Hispanio, Ĝibraltaro, Tanĝero, la Hispana Maroko, la franca Maroko, Alĝerio (pli ol 16!) kaj returne tra Francio kaj Germanio. Averaĝe Willy biciklis po 90 km tage.

– “Pri mia biciklo mi estis tre kontenta. Ĝi estis mia fidela amiko. La lingvo Esperanto tre faciligis mian vojaĝon”, li skribis.

Fine Willy rekomendas al siaj legantoj lerni Esperanton por ke ni pli bone atingu la celon – kompreno inter ĉiuj popoloj.

Mi ne skribis pri la unua parto de la vojaĝo. Willy renkontis esperantistojn kaj vizitis multajn muzeojn kaj aliaj vidindaĵojn – tre rapide. Tiam mi ne maltrankviliĝis pri li, ĉar li ja sciis pri la kutimoj kaj kulturo antaŭe.

La teksto de la libreto preskaŭ ne havas interspacojn kaj la epizodoj dense sekvas unu la aliajn. Se oni ne estas atentiga oni facile maltrafas multon. La filo kaj bofilino de Willy rakontis pri rabistoj, kiujn Willy renkontis. Ĉirkaŭ iliaj talioj estis ŝnuroj kun rostitaj ratoj fiksitaj je la vosto. Kiam la rabistoj malsatis, ili nur tranĉis parton de rato kaj manĝis.

Mi ne trovis tiun epizodon. Eble Willy pensis ke la legantoj ne eltenu tiajn informojn – aŭ eble mi, pro malfacileco legi la tekston, maltrafis tion.

Estu kiel ajn – la tuta rakonto estas interesa!

/ Siv

Esperanto-Stacidomo – de Ralf Fröhlich, Germanio



La Esperanto-Stacio estas internacia renkontiĝejo kaj edukejo en la vilaĝo Halbe tuj sude de Berlino. Ĝi konsistas el du domoj, la stacidomo kaj la stokejo, kaj krome oni uzas la apudan eventejon Kaiserbahnhof (esperante Imperiestra Stacio).

Ĝia programo konsistas el programeroj pri esperanto kaj aliaj lingvoj, pac-aktivado, kulturo, modernigo de la esperanto-movado kaj homaj kaj lingvaj rajtoj. Ekzemploj estas la GLATula renkontiĝo “Fieru!”, “La Printempo de Lingvoj”, “La

Ĥaoso-navigantoj” kaj la ”Esperanto-Dialogo pri Paco kaj Sekureco”.

La renkontiĝejo disponigas 10 loĝ-ĉambrojn en la eksaj fervojistaj loĝejoj kaj 2 grandajn salonojn en la eksa restoracio kaj la eksa biletejo de la stacidomo. Kompleta renovigo estas planata por 2021–22.

La stacidomo estis malfermita en la jaro 1866 kaj pligrandigita en 1915 kaj 1933 kaj nun ĝi estas tri-etaĝa domo kun 800 kvadrataj metroj. La stokejo estas unu-etaĝa kaj havas ĉirkaŭ 400 kvadratajn metrojn. La domaro estas protektita historia monumento kune kun la apuda imperiestra stacidomo.

La Esperanto-Stacion oni atingas rekte de Berlino:

1. per ĉiuhora trajno RB 24 de stacidomoj Berlin-Ostkreuz (38 minutojn), aŭ Berlin-

Schöneweide (29 minutojn) aŭ Königs Wusterhausen (15 minutojn)

2. aŭte laŭ aŭtoŝoseo A13 (30 minutojn)

3. piede ekzemple laŭ la fama 66-laga marŝovojo (2 tagojn)

4. bicikle ekzemple laŭ la biciklovojoj Gurkenweg (esperante kukurba biciklovojo) aŭ Hofjagdweg (vojo de ĉasado de la reĝa/imperiestra kortumo) (minimume 3 horojn)

5. aviadile per flugado al flughaveno Berlino-Schönefeld (15 kilometrojn) aŭ flughaveno Berlino-Tegel (67 kilometrojn).

Ralf Fröhlich rakontas pri la Esperanto-Stacio:
<https://www.youtube.com/watch?v=hm8TgOop6Zc&v=de>

Ralf iam lernis Esperanton en la popola altlernejo de Karlskoga. Lia instruisto estis Lars Forsman. /Siv

Memoro pri vizito al GDR

Rolf-Otto Schulz donas al ni lumstriojn el sia fotaro.

Stralsund, en gammal hansastad, en gång ägd av Sverige (1648–1815).

Stralsund, malnova hansa-urbo, iam posedata de Svedio (1648–1815).



Brandenburger Tor har blivit en symbol för ett enat Berlin, efter murens fall 1989. Ursprungligen fanns det 14 stadsportar i den gamla tullmuren, men bara Brandenburger Tor återstår. Överst sitter en liten fredsgudinna i en vagn, dragen av fyra hästar.

Dödsmarschen. När de allierades trupper närmade sig, hösten 1944, evakuerade tyskarna lägren i Östeuropa. De utmärklade fångarna tvingades gå extremt långa sträckor mot andra koncentrationsläger. De som inte orkade gå tillräckligt snabbt, sköts vid väggkanten. Ordet dödsmarsch myntades av fångarna själva. Ungefär 250 000 dog av utmattning eller mördades. Cirka 1/3 var judar.

Brandenburger Tor fariĝis simbolo por unuiĝinta Berlino, post la falo de la muro en 1989. Origine estis 14 urbo-pordoj en la malnova dogana muro, sed restas nur Brandenburger Tor. Plej supre sidas paciino en ĉaro, tirita de kvar ĉevaloj.

La Mortomarŝo. Kiam la trupoj de la aliancanoj alproksimiĝis dum la aŭtuno 1944, la germanoj evakuis la koncentrejojn en Orienta Germanio. Tiuj, kiuj ne kapablis marŝi sufiĉe rapide estis mortpafitaj ĉe la vojrandoj. La vorton Mortomarŝo faris la kaptitoj mem. Ĉirkaŭ 250 000 mortis pro elĉerpiĝo aŭ estis murditaj. Ĉirkaŭ triono estis judoj.



Ett **vaktorn** vid ett koncentrationsläger.

Checkpoint Charlie är en av de mest kända övergångarna 1945–1990 mellan Berlins båda delar. De Allierade gav platsen dess namn, och namnet är kvar som en symbol från det kalla kriget. Idag finns bara en bevakad kur kvar.

Gardistturo ĉe koncentrejo.

Checkpoint Charlie estis unu el la plej konataj pasejoj 1945–1990 inter la du partoj de Berlino. La Aliancanoj donis la nomon al la loko, kaj la nomo restas kiel simbolo de la "malvarma milito". Hodiaŭ restas nur gardista budo.




Många turister samlas vid Checkpoint Charlie, kanske för att köpa souvenirer.

Byggnad från ett **koncentrationsläger**.

Multaj turistoj kolektiĝas ĉe Checkpoint Charlie, eble por aĉeti memoraĵojn.

Konstruaĵo de **koncentrejo**.



Det äldsta kända **vapnet för Berlin** kom 1280. Redan då var det en björn som symboliserade staden.



La plej malnova konata **blazono de Berlin** venis en 1280. Jam tiam estis urso, kiu simbolis la urbon.

Parlament den Bäume. Denk-stätte den Opfern von Gewalt und Krieg.

La Arboparlamento, loko por pripenso de la viktimoj por perforto kaj milito.

Trädparlamentet, en plats att tänka på offren för våld och krig.



258 offer, 10 drunknade, 25 DDR-gränssoldater.

258 viktimoj, 10 dronintaj, 25 GDR-limsoldatoj.

Finaj vortoj: Bone ke Germanio ne plu estas dividita lando!

El Vikipedio: La Germana Demokratia Respubliko (GDR, germane Deutsche Demokratische Republik), ankaŭ nomita Orienta Germanio, de 1949 ĝis 1990 estis

ŝtato en centra Eŭropo. Ĝi ekzistis samtempe kun la Federacia Respubliko Germanio, kiu konatiĝis kiel Okcidenta Germanio.

ESPERANTOGRUPPENS RESA TILL ELSASS och Euroscola i Strassburg, maj 2001

Deltagare: Björn, Caroline, Jerry, Jonas och deras "postulema instruisto" Folke.



Lördag 5 maj

Avresa kl. 13 från Landvetter flygplats till Frankfurt a. M., där byte till Basel skedde. På flyget kom Jonas och Jerry i samspråk med en svensk företagsledare, som blev så intresserad av esperanto, att han ville göra "la internacia lingvo" till koncernspråk inom sitt företag. Han var i textilbranschen och var på väg till Kina, berättade han.

Vi ankom till Basel kl. 18. Hyrbil var bokad genom resebyrån, och efter vissa problem fick vi kvitterat ut vår bil på den schweiziska sidan; flygplatsen ligger nämligen precis på gränsen mellan Schweiz och Frankrike och är delad mellan länderna.

Vi körde in i Frankrike och fortsatte på motorväg till staden Kolmar. Landskapet är mycket vackert; Vogesernas mäktiga bergsryggar var klädda i ny vårgörnska, och på i stort sett varje höjd låg en borg. Utefter bergssluttningarna och ut mot slätten utbredde sig oändliga vingårdar, där vinstockarna just höll på att få sina första nya blad.

Från Kolmar letade vi oss vidare till den lilla staden Kaisersberg, som ligger i ett bergspass. Kaisersberg var på medeltiden en fri riksstad och har ännu delar av ringmuren bevarad. Våra hotellrum, som bokats från Sverige, fanns på hotell Les Remparts, ett bekvämt medelklasshotell. Ungdomarna bodde i två dubbelrum, Folke i ett enkelrum för sig.

Det mörknade strax efter ankomsten. Kvällsmat intogs på en pizzeria vid huvudgatan, varefter vi gjorde en kort rundvandring genom den mörka staden med dess korsvirkeshus från 1500-talet. Vissa av byggnaderna var strålkastarbelysta, och i skenet kunde vi till vår stora förvåning se storkbon med häckande storkar på taken.

Söndag 6 maj

Café au lait och bröd med smör och sylt plus en skiva Kugelhopf och apelsinjuice: se där vår frukost.



Som första punkt på dagordningen stod besök på Albert Schweitzer-museet. Detta är inrymt i den berömda trippeldoktors, missionärens, musikerns, filosofens och fredspristagarens födelsehus, prästgården, som är sammanbyggd med Kaisersbergs evangeliska kyrka.

Därefter blev det promenad upp till det medeltida tornet, som bevakar den forna fria riksstaden; härlig utsikt uppifrån tornets krön.

På eftermiddagen, på Folkes bestämda förslag, vandring upp i bergen till ett gammalt kapell, St. Alexis, med intilliggande kafé. Jonas stannade kvar på hotellet för en stunds stärkande sömn; Caroline, Jerry och Björn följde med men fick vända halvvägs, eftersom vägen var för blöt och mjuk för deras skor, varefter Folke gick ensam.

På eftermiddagen körde vi ett esperantopass. Vi pratade om fjärilar, "tagaj kaj noktaj papilioj", och jämförde dem med människor. Dessutom tittade vi på det förslag till resolution i parlamentet, som den franske gymnasisten Xavier Dewidehem presenterat. Vi konstaterade, att det var mycket bra men gjorde något tillägg. Vi skrev också ihop ett uttalande, där vi markerade, att – fastän det kunde vara naturligt, att Sverige som ordförandeland tog på sig ordföranderollen – vi ändå stödde den italienske gymnasisten Gabriele Corsettis kandidatur.

Efter esperantopasset gick vi till en liten restaurang, där man serverade Elsass-specialiteter. Björn och Jonas beställde sniglar... Sniglarna, surkålen och det andra sköljdes ner med kvällskaffe på en annan restaurang.

Måndag 7 maj

Efter frukost på hotellet begav vi oss med bilen till grannstaden Kintzheim för att besöka vinmuseet där. Alsace-Elsass är ju ett berömt vindistrikt. Tyvärr var museet stängt, och vi tog en rundtur genom staden till fots istället.

Sedan fortsatte vi med bilen längs en mycket slingrig men vacker väg mellan vingårdarna



och kom så småningom fram till Reichenweier (Riquewihr), som är den kanske mest kända medeltidsstaden i området. Fullt med souvenirbutiker och turister överallt; några mjukdjursstorkar, symboler för Elsass, inhandlades.

Från Reichenweier fortsattes färden på lika slingriga och natursköna vägar genom små, gamla städer och mellan vinfält till Hoh-Königsburg. Hoh-Königsburg är ett medeltida slott, som ligger på ett 700 meter högt berg, högt ovanför slätten mot Rhen. Det förstördes av svenskarna 1633 och byggdes upp igen alldeles i början av 1900-talet, delvis på den tyske kejsarens personliga bekostnad, och ser nu ut som det gjorde på 1500-talet, med allt i yppersta skick. Mycket folk var där, inte minst skolklasser.

Efter lunch i borgens gästgiveri åkte vi till nästa slott, Kintzheim, även det förstört av svenskar under 30-åriga kriget. Här fanns stora rovfåglar – örnar, falkar, glador, gamar etc. från olika delar av världen – som var dresserade av skickliga fågeltämjare, och som fick flyga fritt över besökarnas huvuden. Jonas fick en inte alltför mild smekning av en stor gamvinge. Uppvisningen, som varade en timme, var en stark upplevelse.

Från Kintzheim fortsatte vi mot målet för resan, Strassburg. Vi 6-tiden kom vi fram och hittade efter litet krångel vårt hotell, Formule 1, i Illkirch, en ganska grå och tråkig förort långt från centrum. Första prioritet, efter det

att vi fått våra rum, var ett besök på MacDonaldis i närheten. På kvällen provkörde vi till parlamentet för att säkert hitta dit nästa morgon. Vi fick också viss kontakt med de övriga esperantogrupperna som bodde på hotellet, rumänerna och ungrarna.



Tisdag 8 maj

Efter en tidig och torftig frukost på hotellet gav vi oss av mot parlamentet. Trots att vi kört vägen en gång redan, kom vi fel och blev sena. Vi hamnade i parlamentets nya byggnad, Louise Weiss, och fick motstridiga besked om hur vi skulle ta oss till den gamla, Winston Churchill, på andra sidan floden. Vi var c:a 25 minuter försenade när vi till slut kom fram, men resten av esperantisterna stod då fortfarande i kö utanför ingången.

När tjänstemännen fick klart för sig att vi var SVENSKARNA, gjorde man sig extra besvär för att vi skulle känna oss välkomna – åtminstone kändes det så. Vi togs emot också av bl.a. Gilbert Stammbach, esperantisten från Strassburg, som fått på sin lott allt det praktiska förberedelsearbetet på platsen, och som genom beundransvärd uthållighet gjort denna dag möjlig. En andra frukost intogs på stående fot i foajén, innan alla samlades i gamla plenisalen. Från och med nu var det enbart esperanto som gällde.

En mer utförlig redogörelse för dagens händelser i parlamentet återfinns nedan på esperanto. I korthet kan sägas, att den deltagande esperantogruppen (som bestod av 170 esperantotalande gymnasister med lärare från sju länder: Italien, Frankrike, Sverige, Litauen, Rumänien, Kroatien och Ungern) imponerade genom sitt säkra och mogna uppträdande. Vår ordförandekandidat, Gabriele, var den som

yttrade sig bäst och borde ha valts; vårt resolutionsförslag var det längsta och mest genomtänkta, det presenterades mönstergillt av Xavier och Adela, och det borde ha vunnit. Hur som helst väcktes deltagarnas intresse för vårt språk: detta var antagligen första gången som många av dem hörde namnet esperanto, och högst sannolikt var det första gången de hörde det talas.

Trötta och varma lämnade vi parlamentet vid 17.30-tiden. MacDonalds blev första anhalt (igen), och så åkte vi tillbaka till hotellet. Vi var först tillbaka; rumänerna och ungrarna kom senare, och kvällen ägnades åt trevlig samvaro med några av de rumänska ungdomarna.

Onsdag 9 maj

Vi lämnade hotellet i Illkirch vid 9-tiden. Värdfolket uttryckte sin glädje över att få ha esperantogrupperna som gäster, och värdinnan berättade för Folke, att hon nu själv tänkte lära sig esperanto, som hon verkligen kände är ett framtidens språk.

Vi körde inåt Strassburg för att bese de gamla, centrala delarna, men när vi kom in i staden, visade det sig, att det var fullkomligt omöjligt att hitta en parkeringsplats, så vi gav upp försöket. Istället reste vi direkt norrut, för att enligt resplanen titta på fästningen Schöenburg, som ingår i befästningssystemet Maginotlinjen. Fästningen byggdes mellan åren 1931 och 1940 och utgör en hel liten stad 30 meter under jord.

Innan vi kom fram till fästningen, som ligger ute i skogen, åt vi lunch i Sulz, god elsassisk husmanskost (Maultasche, dvs. grönsaker i pastakuvert, plus rabarberkaka). Vi vandrade runt i gångarna i c:a en timme.

Därefter var det hög tid att köra söderut, mot Basel, där flyget hem väntade. Resan ner tog längre tid än beräknat, då vi kom fel vid infarten till flygplatsen. Vi måste över

gränsen till Schweiz, och vägen dit var inte lätt att hitta bland alla motorvägsmot och förvirrande vägs skyltar. Till slut kom vi i alla fall rätt, fick lämnat in bilen och skyndade oss in i avgångshallen för att checka in. Allt gick

väl, vi lyfte i kvällssolen och såg Basel och Elsass glida bort under oss. Byte i Frankfurt; anlände till Landvetter först efter midnatt.

/ Folke Wedlin

EŬROSKOLA EN ESPERANTO

Marde, la 8-an de majo 2001, la grupo da Esperanto-gelernantoj ĉe la gimnazio de Lerum partoprenis la tiel nomatan Eŭroskolan tagon ("Euroscola") en la Parlamento de Eŭropa Unio en Strasburgo.

Eŭroskola estas rolludo elpensita de la Parlamento por popularigi la Union inter gimnazianoj de la Uniaj landoj; la gejunuloj kunvenas en la Granda Salono de la Parlamento kaj diskutas aktualajn en la Unio demandojn, pri kiuj ili voĉas kiel veraj parlamentanoj. Tiu ĉi jaro estas kiel konate la "Eŭropa jaro de lingvoj", kaj la diskutenda demando evidente estis la rolo de la lingvoj en plivastigonta EU. Ĉu la EU-anoj volos unu oficialan lingvon?

Kelkaj francaj samideanoj sukcese klopodis por ebligi partoprenon de esperantistaj gimnazianoj. Komence oni intencis aranĝi Eŭroskolan tagon nur por esperantistaj gelernejoj, sed kiam montriĝis, ke ne sufiĉe da tiaj partoprenos, oni devis kontentigi sin per miksita Eŭroskola. Kompreneble estis premisite, ke nia lingvo estos egalrajtigata kun la dek unu oficialaj lingvoj de la Unio kaj tial estos interpretata dum la diskutado, sed tiel ne okazis. Strange ŝajnis ankaŭ, ke el la 171 esperantistoj, kiuj ĉeestis, nur 35 rajtis partopreni la efektivan Eŭroskolan en la plenkunsida salono. Al la elektitaj 35, tamen, apartenis ĉiuj la svedoj, laŭ specifa deziro de la Parlamento; nia lando ĉi-duonjare ja estras la Union.

Kiam la Leruma grupo eniris la promenhalon de Winston Churchill-domo en Strasburgo, la oficistoj klare montris, ke ni svedoj estas Tre

Gravaj Personoj. Nombro da afablaj sinjoroj en mallumaj kompletoj bonvenigis nin kaj helpis nin preterpasi la aliajn landogrupojn en la atendvico.

Post la registrado nin ricevis alia afabla sinjoro kun alta frunto kaj malblondaj lipharoj: Gilbert Stambach, strasburga samideano, la viro, kiu per longedaŭraj kaj eltenaj klopodoj ebligis la Eŭroskolan en Esperanto.

Oni ofertis matenmanĝon, kaj poste ĉiuj sidiĝis en kunvena salono. Tie okazis la elekto de la "bravaj tridek kvin", kiuj rajtis sidi en la Granda Salono: ĉiu landa grupo (Francio, Italio, Hungario, Rumanio, Kroatio, Litovio kaj Svedio) taĉmentis principe po kvin gelernantojn. Inter tiuj estis Gabriel Corsetti, filo de Renato Corsetti, kaj la franca gimnaziano Xavier Dewidehem, kiuj jam antaŭe estis proponitaj kiel prezidanto kaj raportoro de la Esperanto-grupo, kaj ankaŭ la juna rumanino Adela Micota.

En la Granda Salono Gabriel prezentis sin kiel kandidaton por la prezidanteco de la Eŭroskola tago. Li paroladis tre bone, kaj lia Esperanto (li estas denaskulo) estis interpretata al la tuta aro en la francan de Xavier. Dum la voĉdonado li ricevis konsiderindan nombron da voĉoj, pli ol 160; elektita, tamen, estis aŭstra knabino.

Posttagmeze la diversaj grupoj diskutis la donitan temon, "Komuna lingvo por interkomprenado". Jam iujn semajnojn antaŭe prezentiĝis interrete propono pri Esperanta rezolucio. Tiu ĉi propono estis verkita de Xavier helpata de la esperantista

veterano Claude Longue-Épée. La rezolucio estis ĉiel tre bona ("pli ol perfektega", komentis Renato Corsetti) kaj estis akceptita de la tuta esperantista aro kun etaj aldonoj kiel ĝia rezolucio. Poste, en la Granda Salono, Xavier laŭregule resumis sian proponon, kiun Adela poste laŭtlegis; ambaŭ forte impresis pro sia certeco. Sekvis konsiliĝo inter la grupaj pledantoj por vortigi komunan proponon pri decido (ĉio ja devis okazi precize kiel en la vera Parlamento).

La fina rezulto de ĉio ĉi estis eldiro, ke lingvosciroj ĝenerale ege gravas, ke ĉiuj lingvoj kaj kulturoj en Eŭropa Unio estu subtenataj kaj protektataj, kaj ke starigo de unu oficiala lingvo de la tuta Unio estus praktika, tamen

neeblas akordiĝi pri kiu lingvo. Menciitaj kiel penseblaj estis la angla kaj Esperanto.

Dum la tagmanĝo, kiun ofertis la Parlamento, estis dirite, ke la gravo de la tago konsistas en la fakto, ke la plej multaj el la kunvenintaj gejunuloj supozeble unuafoje aŭdis pri la Internacia Lingvo kaj aŭdis samsortanoj paroli ĝin. Ke ilia intereso estis vekita, estas certe. Ankaŭ la francaj amaskomunikiloj tre ekinteresiĝis. Krome, al la ĉeestantaj oficistoj de la Parlamento tre verŝajne imponis la brila apero de Esperanto kaj ĝiaj parolantoj.

Resume, estis historia okazaĵo, kiu nepre havos sekvojn.

/ Folke Wedlin

W. H. Trompeter, germana pionira esperantisto



Folke Wedlin diris: "Parolante pri Germanio, ne forgesu skribi pri Trompeter, li estis elstara esperantisto!"

Jen iomete pri **W.H. Trompeter** el Wikipedio:

Wilhelm Heinrich Trompeter, naskiĝis la 22-an de januaro 1839 en Heyde apud Rellinghausen (tiam en Prusio, hodiaŭ urboparto de Essen, Nordrejn-Vestfalio).

Li mortis 63-jara la 7-an de novembro 1901 en Essen.

Li estis "rajtigita subtermezuristo" (geometro de minejoj, germane konzessionierter Markscheider) en Schalke (hodiaŭ urboparto de Gelsenkirchen, Nordrejn-Vestfalio), volapukisto, esperantisto kaj grava mecenato de Esperanto.

Trompeter naskiĝis kiel unu el sep infanoj en malriĉa katolika minista familio. Inter siaj 6-a kaj 14-a vivojaroj li vizitis la katolikan bazan lernejon en Rellinghausen.

1852, en la aĝo de 14 jaroj kaj ankoraŭ antaŭ la fina lerneja ekzameniĝo, li eklaboris kiel ministro (transportisto de minaj ĉaroj per tirado kaj puŝado). Post naŭ monatoj li rajtis reveni kaj inter februaro kaj majo 1853 fini la

bazan lernejon. De majo 1853 li laboris en diversaj minejoj de la regiono lerninte ĉiujn subterajn taskojn kiel profundigo de ŝakto, instalado de pumpiloj, starigo de maŝinoj ktp.

Paralele li de 1853 ĝis 1855 vizitis dimanĉan lernejon por teknika desegnado kaj matematiko. En 1856 li, nun 18-jara, sukcesis esti akceptita kiel ministra lernanto en Essen.

Inter 1861 kaj 1863 Trompeter plenumis sian devigan milit-servon en la prusa armeo en Münster (Vestfalia). En 1864 li kiel suboficiero partoprenis la militon kontraŭ Danio kaj ricevis militan honorsignon de dua grado pro la sturmo kontraŭ Düppel (dane Dybbøl), la decida batalo de tiu milito je la 18-a de aprilo 1864.

En 1865 li pro la malbona ekonomia situacio kaj la vasta senlaboreco denove devis labori kiel simpla ministro, ĝis kiam li en 1866 fariĝis inspektoficisto.

La militon inter Prusio kaj Francio en 1871 li devis partopreni en milicia bataliono starante en Francio. "Por la interrilatoj kun la loĝantoj", Trompeter skribas en sia aŭtobiografio, "mi profitis de tio, ke mi private iom lernis francan lingvon".

Volapuko kaj Esperanto

Trompeter unue estis volapukisto antaŭ ol li lernis Esperanton. Kiam en 1891 L. L. Zamenhof perdis ĉian esperon daŭrigi eldonadon de la sola Esperanta gazeto "La Esperantisto" pro manko de monrimedoj, Trompeter prenis sur sin ĉiujn elspezojn de la gazeto por tri jaroj (1892–1894) kaj oferis monate 100 markojn por la redaktoro.

Per lia helpo ankaŭ aperis kelkaj gravaj libroj. En 1890 Trompeter fondis grupon en Schalke. Li liveris materialon por "La Esperantisto" kaj

verkis kune kun Christian Schmidt lernolibron.

Trompeter estis kontraŭulo de la grandaj lingvaj reformoj, kiujn Zamenhof en 1892 konsideris kaj en "La Esperantisto" prezentis al la diskuto de la tiama samideanaro. Nur kelkajn aliigojn li proponis: e anstataŭ (?)^{*} kaj, z anstataŭ s en komenco de silaboj, saman finaĵon –a por adjektivoj kaj adverboj k. a. Laŭ Zamenhof: "En la historio de Esperanto al li apartenas ĉiam la plej grava, neniam elŝirebla, neniam elstrekebla paĝo". (Originala Verkaro 1929, p. 222).

Kio estas skribita en libroj pri Trompeter? Bv legi ĉe

[https://eo.wikipedia.org/wiki/W. H. Trompeter](https://eo.wikipedia.org/wiki/W._H._Trompeter)

*** En la supra artikolo, el kiu mi prenis la artikolon, mankas litero: "e anstataŭ...." ? Ĉu iu scias? /Siv**



El la biblioteko: Heinrich Heine: Elektitaj poemoj

origine en la germana, tradukitaj en Esperanton de F. Pillath

Pinarbo staras sola

Pinarbo staras sola
En nordo sur nuda altaĵ'.
Ĝi dormas; el neĝ' kaj glacio
Ĝin kovras blanka litaĵ'.

Sonĝadas ĝi pri palmo
Ĝemanta en orient',
Soleca, sur arda deklivo
En maldolĉega silent'.

Reĝo estas la paŝtisto

Reĝo estas la paŝtisto,
Verda monto lia tron',
Super lia kap' la suno
Estas peza, ora kron'.


Ĉepiede kuŝas ŝafoj –
Flatemuloj – sur la ter';
La bovidoj – kavaliroj –
Ĉirkaŭvagas, kun fier'.

Jen aktoroj – virokaproj;
Kaj la birdoj, bovinar'
Kun la flutoj, sonoriloj
Estas reĝa ludistar'.

Ĉio sonas, kantas ĉarme,
Kaj pli milde muĝas eĉ
Akvofal' kaj pinaj arboj, –
Jen ekdormas juna reĝ'.

Ĉio sonas, kantas ĉarme,
Kaj pli milde muĝas eĉ
Akvofal' kaj pinaj arboj, –
Jen ekdormas juna reĝ'.

Intertempe devas regi
La ministro – hund-fripon', –
Kies grumbra bojregado
Rondaŭdiĝas kun reson'.



Dorme diras juna reĝo:
"La regado tudas min;
Ho, mi volus, ke mi hejme
Estu jam ĉe la reĝin'!"

En la brakoj de l' reĝino
Kiel reĝ' ripozos mi;
En okuloj ŝiaj ĉarmaj
Estas mia imperi'!"

Das Glas Blas Sing Quintett (pli ĝuste Kvarteto*)

Inga Johansson trovis la jenan germanan ludgrupon interrete. La vorto "ludi" signifas kaj trakti instrumenton kaj ludi ludon. La sveda havas du vortojn: spela – (ludi la

gitaron) kaj leka – (ludi indianoj). Tiu muzikgrupo vere kombinas la du signifojn. Ili ĝuas la ludon. Aŭskultu kaj ankaŭ vi ĝuegu!

<https://www.youtube.com/watch?v=2D43uVlbNi8>



* **Inga klarigas:** "Glasblasing – GlasBlasSing estas **kvarteto** de Germanio – ili komencis kiel kvinteto en 2002, sed fine de la jaro 2017 unu membro forlasis la grupon.

Ili faras muzikon per boteloj, kaj aliaj iloj. Ekz. du el ili enmetas siajn fingrojn en la boteloj

kaj tiel ekestas ia plopa sono. Ili preferas blovi kaj bati la botelojn."

Post "Rondo alla Turca" venas alia muziko fare de Mozart: "Türkischen Marsch":

https://www.youtube.com/watch?v=IXKNbVOK_78

El Kongo:

La Virinan tagon oni celebru ne nur la 8an de marto!

Jen letero de Augustin Kakozwa

Saluton gekaraj,

Kiel vi scias, okazas ĉiujare la 8an de Marto la internacia virina tago en Goma urbo en la orienta parto de la



Respubliko Demokratia Kongo. Nia organizo "Asocio Nova Familio" prizorgas la infanajn georfojn kaj ilin esperantigas.

Ni elektis taŭgan grupon por promocio la virinojn, kiuj kapablas kaj rajtas havi siajn valorojn en la socio.

Ni sukcesis organizi tiun eventon dank' al gastigantaj "gepatroj" de niaj georfoj, kiuj penis kontribui malgraŭ malfacilaĵoj. Ankaŭ dank al persono, kiu iomete monhelpis.

Ni organizis multajn eventojn, ekz. la jenajn:

☆ Prelego pri tiu tago, ☆ deklamo de poemaro, ☆ intervjuo, ☆ danco de la tradiciaj dancoj, kaj poste ☆ manĝaĵo.

Ni malsupre prezentas tiun programon, kaj la intervjuon. Ni alkroĉas ankaŭ fotojn. Ni antaŭe publikigis artikolon ĉe facebook, kaj ĝojas ke multaj legantoj ŝatis la eventojn. Ni elkore dankegas ĉiujn.

Poemo okaze de la internacia tago la 8an de marto 2020 en Goma urbo

Ni filinoj de la Nova Familio, laborantaj en la urbo Goma estas feliĉaj memorfesti ĉi tiun tagon, la 8an de marto.

La tagon ni dediĉas al Klara, la edzino de Doktoro Zamenhof, ŝiaj du filinoj Sofio kaj Lidia kaj al ĉiuj vi virinoj en Esperantujo, en ĉiuj anguloj de la mondo.

Knabinoj, virinoj, leviĝu! Ne plu timu, ne plu forgesu nin, ĉar nia emancipiĝo venis!

Jes ni povas! Jes ni kapablas!

Ni kuraĝu lerni Esperanton, apliku ĝin en niaj familioj, instruu ĝin al niaj infanoj, ĉar ni estas mastrinoj de niaj hejmoj. Amu ni unu la alian!

La situacio en nia lando kaj precipe en nia regiono estas malfacila:

Ĉi tie trapasas multnombraj kaj senĉesaj militoj! Jen kial ni fariĝis georfoj.

Ĉi tie ni suferas sekserfortojn. Jen kial ni devas defendi nin kaj lukti por ni!

Sen edukado ni virinoj nek sentas kiujn ajn valorojn, nek konsideras nin parto de la socio.



Jen niaj manoj etenditaj al ĉiuj, kiuj aŭdos niajn kriojn de alarmo, por fine subteni nin.

Dankon!

Skribita de Nathalie Balekemabaka Goma, Kongolando

Intervjuo fare de Augustin kun Jacqueline

okaze de la Internacia virina tago la 8a de Marto 2020 en Goma urbo

Augustin: Saluton fraŭlino Jacqueline.

Jacqueline: Saluton sinjoro Aŭgustino.

Augustin: Kial vi memorfestas hodiaŭ?

Jacqueline: Ni festas ĉi tiun tagon por memori la daton kiam ni virinoj ekhavis nian emancipiĝon, tio estas ke ni fariĝis egalaj al

viroj, kiuj longe sole agis kaj laboris en lokoj kie ni virinoj ankaŭ kapablas agadi kaj labori.

Augustin: Ekde via emancipiĝo, ĉu vi sentas subpremon aŭ ĉu vi kapablas agi kiel viroj kaj atingi ĉion, kion ili faras, ne ignorante viajn kapablojn kiel virinoj?

Jacqueline: Jes, ni sentas nin fortaj kaj kapablaj fari ĉion kiel viroj. Ekzemple okupi strategiajn postenojn en la socio, fariĝi ministro, deputito, reganto, prezidanto, ...

Augustin: Vi laboras en la Esperanto-movado, precipe en la Asocio Nova Familio, kiun vi jam fondis ĉi tie en Goma, post la morto de viaj gepatroj. Kian mesaĝon vi ŝatus doni rilate al Esperanto al la virinoj el ĉiuj anguloj de la mondo, kiuj ankoraŭ ne malkovris ĉi-tiun universalan lingvon?

Jacqueline: Kiel vi diris, ni virinoj, oni ne plu povas neglekti nin. Ni jam fondis la Asocion Nova Familio post kiam niaj gepatroj mortis. Ni lernas Esperanton kun inspiro kaj verovo, do ni invitas aliajn virinojn lerni ĝin, ĉar ĝi estas lingvo de paco, kuniĝo kaj amo.

Augustin: Vi menciis, ke vi estas membro de la Nova Familio, en kiu kuniĝis orfinoj kaj orfoj. Kiaj estas la malfacilaĵoj kiujn vi renkontas? Kaj kiel vi planas trovi solvojn?

Jacqueline: La malfacilaĵoj estas multaj, sed la prioritatoj estas trovi rimedojn por kovri la prizorgadon de niaj 86 georfoj, kiuj bezonas manĝaĵojn, gastigantajn familiojn kaj monon por pagi la edukojn – lernejojn, lerneajn uniformojn, kiuj estas devigaj por partopreni en la lernado kaj la lernomaterialon kiun ĉiu lernanto devas mem pagi.

Kiam niaj pli aĝaj georfoj estos edukitaj, ili povos labori por kunfinanci nian vivon. Sed unue ili devas havi bonan edukon por pli bona espero kaj bona estonteco.

Augustin: Dankon pro la intervjuo kaj ĉion bonan al vi kaj la Asocio Nova Familio.



Nome de la Asocio Nova Familio:

Augustin KAKOZWA la kunordiganto.

Kontaktebla ĉe :augukako@gmail.com

Wathsapo: +243971777480



Familjeliv i en annan del av världen!



La tuta familio Bürgemeister: Håkan, Lisa, Agneta kaj Oscar.

Assalamu alaikum – Frid vare med er!

Under flera år levde familjen utomlands, bl.a. i Pakistan, eftersom maken arbetade för FN.

Då han ofta tre till fyra veckor var på uppdrag var det min lott att svara för vardag och familjeliv med barnen Oscar och Lisa.

Under året i Pakistan, som är ett strängt muslimskt land, bodde vi hela tiden i Rawalpindi utanför huvudstaden Islamabad.

Under makens olika uppdrag hade vi ingen som helst kontakt, detta var före mobiltelefoner och annat.

När han kom hem reste vi så mycket som möjligt, bla i Pakistan, Indien, Nepal och Kina.

När vi var ensamma hemma hade vi våra rutiner. Oscar läste på brevskola och Lisa gick i pakistansk skola med undervisning på engelska och urdu. Alla hade skoluniform och

Familia vivo en alia parto de la mondo

Assalamu alaikum – Estu paco kun vi!

Dum pluraj jaroj la familio vivis eksterlande, i.a. en Pakistano, ĉar la edzo laboris por U.N.

Kiam li ofte, tri ĝis kvar semajnojn, komisiitis, estis mia tasko respondecigi pri ĉiutaga kaj familia vivo kun la infanoj Oscar kaj Lisa.

Dum la jaro en Pakistano, kiu estas rigore muzulmana lando, ni loĝis la tutan tempon en Rawalpindi, ekster la ĉefurbo Islamabad.

Dum la diversaj komisiroj de la edzo, ni havis nenion ajn kontakton, tio estis antaŭ la tempo de poŝtelefonoj k.a.

Kiam li estis hejmenveninta, ni vojaĝis kiel eble plej multe, i.a. en Pakistano, Hindio, Nepalo kaj Ĉinio.

Kiam ni estis solaj hejme, ni havis niajn rutinojn. Oscar studis per leter-lernejo kaj

varje dag började med uppställning och kontroll av rena naglar och att sjunga den pakistanska nationalsången.

Lisa trivdes bra och fick många vänner. Har ännu idag kontakt med några.

Ofta tog vi bussen till centrum och då fick allt ändras i bussen. Inga män fick sitta bredvid Lisa och mig.

Vi var alltid klädda traditionellt med bl.a. huvudduk.

En dag åkte Oscar med en kamrat på taket av en buss. Där var det fullt av män och bussen i övrigt var fullpackad. Han vinkade glatt under detta äventyr och kamratens mamma fick en mindre chock.

Mycket hände men det gällde att var flexibel med bl.a. ofta och långa strömbrott.

Men vi trivdes bra och fick många vänner och hjälpsamma grannar.

Vi blev bl a bjudna på tre bröllop.

Dagarna var innehållsrika med många försäljare – dansande björnar och att flyga drake.

Klimatet och värmen var jobbigt – men vi fick många positiva minnen och fick prova på den lokala maten och lära oss om den inhemska kulturen.

Vi åkte också tillbaka för att hälsa på och uppleva miljön. /Agneta Bürgemeister



Lisa en la lerneja uniformo.

Lisa frekventis pakistanan lernejon kun instruo angle kaj urde.

Ĉiuj portis lernejan uniformon kaj ĉiun tagon komenciĝis per formacio kaj kontrolo de puraj ungoj kaj kantado de la pakistana nacia himno.

Lisa sentis sin bone kaj havis multajn amikojn. Ankoraŭ hodiaŭ ŝi havas kontakton kun kelkaj.

Ofte ni vojaĝis per buso al la centro kaj tiam ĉio devis esti ŝanĝita en la buso. Neniuj viroj rajtis sidi apud Lisa kaj mi.

Ni ĉiam estis vestitaj tradicie kun i.a. kaptukoj.

Iun tagon Oscar veturis kune kun kamarado sur la tegmento de buso. Tie estis plene de viroj kaj krome la intero de la buso estis plenplena. Li gaje svingis la manon dum ĉi tiu aventuro kaj la patrino de la kamarado iomete ŝokiĝis.

Multo okazis, sed necesas esti fleksebla, i.a. pri longaj elektraĵ interrompoj.

Sed ni sentis nin bone kaj ricevis multajn geamikojn kaj helpemajn najbarojn.

Ni estis i.a. inventitaj al tri geedziĝfestoj.



La tagoj estis enhavriĉaj kun multaj vendistoj – dancantaj ursoj kaj kajtoflugado.

La klimato kaj la varmeco estis ĝenaj – sed ni ricevis multajn pozitivajn memorojn kaj povis testi la lokan manĝaĵon kaj lerni pri la enlanda kulturo.

Ni ankaŭ revojaĝis por viziti kaj resperti la medion.

/ Agneta Bürgemeister

Carl-Olof Selenius: pri mia traduko de "La knabo kiu vivis kun strutoj" kiun verkis Monica Zak



Antaŭ kelkaj jaroj mi komencis esperantigi svedan porinfanan libron de Monica Zak. Nun, kiam la rezulto troveblas – kaj rete kaj kiel papera libro – mi fieras. Sed ne mi, unu persono, tion estigis. Dum la proceso, ekde la ideo ĝis la preta libro, min helpis kelkaj personoj kaj retpaĝoj.

Unue, per la reta lernejo Lernu mi renkontis Louise Agnesdotter, ankaŭ ŝi lernanto de Esperanto. Kune ni decidis esperantigi "Ture Sventon i öknen". Multe da tempo tiu tradukado postulis, sed tiu laboro donis al ni multajn bonajn okazojn por diskuti gramatikaĵojn, vortelektajn kaj stilistikon. Ni do lernis multe.

La dua renkonto okazis dum informa kunveno de la Komitato por Okcidenta Saharo, Västsaharakommittén. En la enirhalo troviĝis librotablo kun broŝuroj kaj libroj pri tiu lando Okcidenta Saharo, kiu, parte okupita de Maroko, ankoraŭ post generacioj atendas sian sendependecon. Unu el la libroj sur la tablo estis "Pojken som levde med strutsar", kaj ĉe la tablo staris la verkisto mem. Mi rakontis al ŝi, ke mi volas traduki tiun ŝian

interesan libron en Esperanton. Ŝi ĝoje aprobis la ideon, kaj baldaŭ poste mi komencis.

Kiel mian trian gravan renkonton mi rigardas la "gotenburĝan" retan vortaron de Ebbe Vilborg. Ĝia abunda frazprovizo faris duonon de mia traduklaboro. Precipe ĝia traserĉa rimedo helpis min multe. Per tiu mi povis uzi la sveda-esperantan vortaron retrodirekte por trovi ĉiujn svedajn ekvivalentojn de certa esperanto-vorto. Fakte tiu eblo ofte estas pli utila ol uzi eĉ la plej bonan esperanto-svedan vortaron, ĉar ĝi trovas ankaŭ utilajn flankajn trakojn, krom la ekzakta traduko.

La sekva renkonto estis kun Lulu, la reta eldonej-servico, kiu presas librojn laŭbezone. Tio signifas, ke ĝi neniom presas antaŭ ol iu mendas ion. Nur se iu mendas ekzemple unu ekzempleron, Lulu presas unu ekzempleron kaj sendas ĝin tuj. Mi mem devis fari la tutan eldonistan laboron. Post multe da eksperimentado per la interretaj formularoj de Lulu, kaj post interkonsento kun la desegnisto pri kopirajto, mi fine havis miajn ekzemplerojn de "La knabo kiu vivis kun

strutoj”. La libro nun estas aĉetebla de Libroservo de UEA aŭ de www.lulu.com aŭ de Eldona Societo Esperanto. Oni ankaŭ povas legi la libron senkoste per la retpaĝo de Lulu.

La plej lasta renkonto okazis post kiam la libro jam estis publikigita. Unu aŭstralia Esperanto-instruisto, Franciska Toubale, atentigis min rete, ke la libro enhavas multajn erarojn, kaj proponis, ke ŝi uzu sian covid-izoladan tempon por relegi la libron kaj listigi la erarojn. Kiam mi poste legis ŝian longan liston, mi hontis, ĉar se mi antaŭe scius, ke tiom da tre bazajn gramatikajn malĝustaĵojn mi kapablis produkti kaj ne observi, tiam mi neniam aŭdacus komenci mian tradukon. Nun mi devas korekti la erarojn, por ke novpresitaj ekzempleroj estu pli bonaj. Mi ankaŭ volas sendi liston de la eraroj al tiuj, kiuj jam aĉetis la libron. Mi sendos ĝin al vi, se vi kontaktiĝas kun mi.

La libro temas pri dujara knabo en Okcidenta Saharo, kiun la patrino perdis dum

sabloŝtormo. Strutoj kaj aliaj bestoj edukis lin. Dum multaj jaroj li havis neniun kontakton kun homoj. Post sia reveno al sia homa familio li sukcesis mirinde facile readaptiĝi al homa vivo, sed li ĉiam parte identiĝis kiel struto. La rakonto ne estas nura fikcio. Ĝi estas bazita sur buŝa tradicio pri tia knabo, kaj precipe raportas kion rakontis la filo de tiu knabo. Kiam Monika Zak vizitis tiun filon en tendaro por rifuĝintoj en la dezerto, lia patro, la knabo mem, estis jam mortinta, post multjara homa vivo, sed la filo kaj multaj rifuĝejanoj bone memoris lin. Nun ankaŭ esperantistoj havas la ŝancon konatiĝi kun li.

Infanoj verŝajne povas ŝati la rakonton pro ĝia ekscitaj aventuroj. Plenkreskuloj eble trovas pripensindaj multajn aferojn pri gepatreco, interspeca kompreno, simileco de sociaj bezonoj, kaj pri kredebleco de buŝa tradicio. Por mi la libro funkciis ankaŭ kiel interesa Esperanto-lernilo.

Carl-Olof Selenius

Nova romano de Julian Modest

TRA LA PADOJ DE LA VIVO

romano, originale verkita en Esperanto

En la romano “Tra la padoj de la vivo” Julian Modest talente priskribis la luktojn de sola patrino kun filino, la konfrontojn, la proponojn plej diversajn, ofte ne utilajn, eĉ dubindajn. Ĉu la protagonistino sukcesas ĉiam esti forta virino? Ĉu ŝi ĉiam faras la ĝustajn decidojn? Tiu ĉi romano kunportas vin sur la pado tra ŝia vivo kaj rivelos al vi la respondojn.

”Do, tiuj estas la elementoj kaj la altnivela dialogo subkuŝanta la simplan tekston verkitan de Modest, aŭtoro kiu kaj per rekonstruado de la lilita mito, kaj per dialogo kun la plej grava teksto de la kristana kulturo, rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante alfrontas la

Tra la padoj de la vivo



Julian Modest

defiojn, kaj venki la pruvon de l’ tempo, kaj prezenti al la esperantlingva legantaro novan verkon, per kiu li denove montras sin plene kapabla reklami por si plenrajtan seĝon inter

la eminentuloj de la Verda Parnaso. Ĉi-sence, oni ja povas aserti, ke (finfine!) Modest reprenas la ĝustan padon kaj batalas la bonan batalon; kaj ĉar pri gardado de la fido ne estas dubo, mankas nur scii ĉu per novaj verkoj li finos la kuradon.”

El la antaŭparolo de Fernando Pita
Rio-de-Ĵaneiro, la 08-an de Majo 2020

La libron eldonis Eldonejo "Libera", Belgio. La libro estas aĉetebla ĉe la eldonejo kaj ĉe UEA.

Turka Stelo

La redaktoro de la retgazeto Turka Stelo estas Vasil Kadifeli. Li skribas sur la unua paĝo:

”Pro la kronviruso homoj restas hejme kaj tiel ankaŭ la malutileco, kiun ni kaŭzas al nia ĉirkaŭaĵo, malmultiĝas. Ekz. la atmosfero tiom puriĝis, ke Uludag monto, kiu troviĝas en distanco de 105 km for de Istanbulo komencis vidiĝi tiom klare... [...]”

Liaj konsiloj similas al la niaj: “[...]... restu hejme kaj trafolumu nian revuon...”

Jen la ligilo al la tuta julia numero:

<https://issuu.com/vasilkadifeli/docs/turka-stelo-055 - 2020.07>



Mi (Siv) prenas la jenan tekston de la julia numero:.

Safak Yildiz, Turkio, sendis ĉi tiun rakonton al Turka Stelo:

Kat-rakonto el Turka Stelo, la julia numero

lun tagon, Maria volis vojaĝi de Istanbulo al Izmiro.

Maria aĉetis aŭtobus-bileton. Ŝi estis malĝoja.

Ŝi diris al la ŝoforo: ”Mia senliphara nigra kato estas en ĉi tiu plasta skatolo. Bonvolu esti atentema pri ĝi!”

La nomo de la ŝoforo estis Peter. Peter prenis la platan skatolon kaj metis ĝin en la valizujon sub la aŭtobuso.

Je la unua ripozloko la ŝoforo zorgis pri ĝi, sed ne aŭdis miaŭon. Je la dua ripozloko la ŝoforo zorgis pri ĝi, sed li denove ne aŭdis miaŭon.



Je la tria ripozloko la ŝoforo zorgis denove pri ĝi, sed denove neniu miaŭo aŭdiĝis.

Li maltrankviliĝis kaj malfermis la skatolon kaj trovis mortintan katon en ĝi.

Li diris al si ”Ho mia Dio! La kato mortis. Kial ĝi mortis? Nun, kion mi faros? La virino malĝojos kaj koleros kontraŭ mi! Ho mia Dio!”

Peter serĉis unu nigran strat-katon kaj trovis ĝin. Li tondis ĝiajn lipharojn kaj vidis, ke ĝi estis sufiĉe simila al la morta kato. Li anstataŭigis ĝin kun la morta kata en la skatolo.

Kiam ili atingis Izmiron kaj Maria reprenis la skatolon ŝi rigardis en ĝi kaj ŝokiĝis. Ŝi diris: "Ho, mia Dio! Ĉi tiu ne estas mia kato. Hieraŭ mia kato mortis kaj mi volis enterigi ĝin en la ĝardeno de mia domo en Izmiro. Kie estas mia kato? Ho, mia Dio!"

Komento de Turka Stelo: Safak Yildiz estas komencanto en Esperanto.

Zorgu pri la komencantoj! Ili estas la estonteco de la Esperanta movado. Kuraĝon al ĉiu komencanto, kiu volas kontribui al la enhavo de gazetoj, ĵurnaloj!!

Mi nur havas unu demandon: Kial la rakonto estas ilustrita en Turka Stelo per "La krio" (Skriet) farita de la norvega pentristo Edvard Munch? /Siv

Pri cifereco

En sveda radioprogramo, oni aŭdis la jenan:

– La vivon oni pli kaj pli vivas ciferece – fakte tre utile, precipe en pandemiaj tempoj. Oni povas havi kontaktojn kun la tuta mondo. Tamen – virtualaj kontaktoj ne povas anstataŭigi verajn kontaktojn, verajn brakumojn.

Jen la vico de la plej evoluigintaj landoj koncerne interreton kaj aliajn ciferecajn helpilojn:

- 1) Danio
- 2) Sudkoreo
- 3) Estonio
- 4) Finnlando
- 5) Aŭstralio
- 6) Svedio



*Cifereca horloĝo
(bildo de Pixabay)*

Ŝajnas ke malgrandaj landoj superas al grandaj landoj.

Koncerne **nekontanta pago** (per kreditkarto, swish k.t.p.) Svedio estas la plej "nekontanta" lando en la mondo.

Bone aŭ malbone? Mi ne scias. Povas esti problemo por turistoj.

/ Siv

Pri la vorto **diĝita** (svede: digital) vidu:
<https://eo.wikipedia.org/wiki/Cifereca>

/ Inga

